

revuo

esperanto

aprilo 1965

58-a jaro

n-ro 713 (4)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)



ESPERANTO

revuo internacia

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef. (010) 23 27 88. Girkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1965): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj:

0,20 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 81 landoj.

Estrararo de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, 7 Linnaean Street, Cambridge, Mass. 02138, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, 8057 Zürich, Svislando.

enhavo

- 61 La junularo: ŝlosila medio (Becker)
- 62 Pri la agado de la lokaj grupoj:
3. Kie formiĝas la vera esperantisto? (Wensing)
- 63 Lastaj progresoj de la subskribo-kolektado
- 64 La 50-a volumo de STAFETO (De Diego)
- 67 Muziko en ligno (pri bambuartaĵoj)
- 68 Alfabetoj kreotaj por 5 afrikaj lingvoj
- 69 Kiel indiki la familiajn nomojn
- 70 CED
En la grupoj
- 71 Recenzoj
- 74 Ricevitaj eldonaĵoj
"Tankae" (Lobut)
- 75 Mallongaj novaĵoj
- 76 La Juna Vivo
- 77 Esperanto en radio
Nekrologoj Casanovas, Ben Alter
- 78 Oficiala informilo n-ro 378
50-a Universala Kongreso, Tokio, 1965
- 79 La internaciaj konkursoj 1965
Anoncetoj

kovrila bildo

Tradiciaj festoj en Japanujo (foto: Japana Nacia Turisma Organizaĵo)

bildojn liveris

- 66 (Malsupre) Guerra
- 67 Japana Nacia Turisma Organizaĵo

**oficiala organo
de universala
esperanto-asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

esperanto
aprilo 1965

Neniu el ni hodiaŭ dubas aŭ ne rajtus dubi, ke por nia Esperanto-movado la plej grava tasko devus esti kiel eble plej multe informi la junularon kaj altiri ĝin al niaj rondoj. La jaro 1963 estis speciale dediĉita al la Esperantista Junularo kaj donis ankaŭ relative grandan antaŭenpuŝon. Tamen la problemo restas eterna. Multaj progresoj estas faritaj ekde kiam TEJO fariĝis junulara sekcio de UEA: Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, kiu nuntempe prezentigas kun dudeko da Landaj Sekcioj kaj proksimume 10 000 membroj.

Malgraŭ multege da klopodoj de la Estraroj de TEJO kaj de ĝiaj Landaj Sekcioj, la situacio tamen ne estas brila kaj la plibonigo de tiu situacio bezonas en la komuna intereso ĉies helpon. Por nia Esperanto-movado tio estas demando de vivo aŭ de morto. Neniu kolektivo vivas en sama konsisto eterne, ĉiam devas aperi novaj fortoj. Oni diros verŝajne, ĉar mi estis Prezidanto de TEJO kaj nun ties Honora Prezidanto, ke mi ankoraŭ nun havas preferojn por la junulara movado. Tute prave! Sed tamen ŝajnas al mi, ke tiu, kiu detale studas la problemojn de nia movado, venos al la sama konkludo: La problemoj de la Esperantista Junularo estas niaj problemoj.

Ne nur la Komitato de UEA kaj la Estraro devus pli multe okupiĝi ankoraŭ por trovi kaj doni pli efikan helpon al TEJO. Ne nur la Landaj Asocioj zorge plifaciligu la laboron de la Junularaj Sekcioj. Precipe sur tiu kampo estas ankoraŭ multo farenda, ĉar malgraŭ multaj alvokoj ĝis nun ne ĉiuj Landaj Asocioj fondis junularan sekcion.

Ne nur la lokaj grupoj estu larĝe malfermitaj por gejunuloj kaj laŭeble instigu la fondon de junulara loka grupo. Ĉiu unuopa esperantisto prenu la kutimon daŭre pensi pri la afero kaj helpi.

Tutcerte la Junularo donas novajn perspektivojn al la Esperanto-movado. Kreskas la intereso pri ĝeneralaj junularaj problemoj sendepende de Esperanto. Bona ekzemplo por tio estas "Kontakto". TEJO aparte interesiĝas pri eksteraj kontaktoj, pritraktas komunajn problemojn kun aliaj organizoj, okupiĝas pri ĝeneralaj rezultoj de la lingva diverseco. Mi menciui en tiu rilato la Kampanjon NEO. Gojiga estas ankaŭ la pliproksimiĝo de TEJO kaj STELO. Alia perspektivo estas la rilatoj inter lernejoj kaj la junularo. Ĝis nun malgraŭ la fakto, ke en ĉiam pli kaj pli da lernejoj estas instruata Esperanto kaj sekve multaj lernantoj povus fariĝi membroj de TEJO, la alfluo ne estas granda. Tiurilate la influo de la instruistoj tutcerte povos multe helpi. TEJO speciale ofertas lerneajn abonojn de "Kontakto" je tre favoraj kondiĉoj. Ĝi subtenas ĉiujn alispecajn aktivadojn kaj tre varme rekomendas partoprenon en la Internacia Junularkonferenco pri Komunikado en la Anne-Frank-Domo en Amsterdam. Se jam

neesperantista organizaĵo organizas tian konferencon ankaŭ en Esperanto, oni devus konvinki multajn gejunulojn kaj subteni ilin por tien iri.

Al alia problemo necesas doni ankaŭ plej grandan atenton. Estas la neceso eduki kaj prepari gvidantojn de la Esperanto-movado. TEJO planas seminariojn por gvidantoj, el kiuj la unua okazos pli malfrue ĉi-jare. Sekve de la Dua Baza Laborplano de UEA ĝi ellaboris Bazan Perspektivan Laborprogramon. Ĝi havas kelkajn gravajn servojn, ekz. Korespondajn Servojn de la LS kaj Tradukan Servon kaj kompreneble laborigas Informajn Fakojn laŭ la skemo de UEA. Nuntempe oni nur rigardu la agadplanon por la Jaro de Internacia Kunlaboro.

Konkrete helpo

Kiel vi vidas, malgraŭ multe da malfacilaĵoj, kiujn mi ĉi tie ne povas detale analizi, la esperantista junularo bone laboras, sed ĝi bezonas pli multe da konkreta helpo en formo de subteno kaj apogo. Kiel ni rigardu la aferon? La Komitato de UEA donis tre favorajn financajn kondiĉojn al TEJO, kaj multaj Landaj Asocioj simile helpas al la Junularo. Tamen ne ĉio glate funkcias kaj kontentige evoluas unue pro la specialaj psikologiaj problemoj de la junularo kaj due pro tro malgranda kompreno de la aliaj por tiuj problemoj kaj sekve neadekvata helpo. Oni devus doni — ankaŭ ĉiu unuopulo — similan atenton kaj financan subtenon al la junulara movado kiel hodiaŭ multaj bonstataj landoj donas al evolulandoj, eĉ se la riskoj estas grandaj. Kion mi do tute konkrete proponas pri helpo al TEJO mem? Oni larĝe kontribuu al la Fondaĵo Junulara Gazeto kaj oni mem abonu "Kontakton". Oni instigu gejunulojn fariĝi J-MA aŭ MA-K de UEA. Se necese, oni donacu tiajn abonojn kaj pagu membrokotizojn eble sekve de konkursoj k. a. Tutcerte junulo, kiu tiamaniere fariĝis membro kaj ricevis la du revuojn kaj jarlibrojn, ŝatus resti membro. En tiu rilato oni ne forgesu la Fondaĵon Canuto, speciale por nepagipovaj landoj. Oni peru aŭ donacu lerneajn abonojn de "Kontakto". Tio estas tre rekomendinda, ĉar estas nur 6 entute nun, el pli ol 600 lernejoj.

La plej granda agadkampo kompreneble estas la loka. Ĉi tie ni ja informas, varbas, instruas, kunvenas kaj sekve de bona laboro ni vidas, ke la junularo estas sufiĉe facile alirebla kaj ŝatas okupiĝi pri la ideo de internacia kunlaboro — tutcerte pli volonte ol plenkreskuloj.

Ni esperu, ke en la nuna jaro ni trovos kiel eble plej favoran grundon, ĉar ni bezonas la Junularon kaj por vere interkompreniĝi la Junularo bezonas la Internacian Lingvon.

Günther Becker

esperanto
aprilo 1965

3: KIE FORMIĜAS LA VERA ESPERANTISTO?

Oni rajtas supozi ke homo kiu decidiĝis lerni Esperanton sentas sin iel altirita al la ideo de internacia, neŭtrala lingvo kaj ke li (ŝi), ĉu konscie ĉu subkonscie, mense okupis sin pri la ĥaosa lingva situacio reganta en la hodiaŭaj, interlandaj kontaktoj. Samtempe oni rajtas supozi ke ĉiu kiu ekdecidis lerni la lingvon, klare vidas ke ne estas tiel ke la tuta mondo — kvazaŭ per ekbato de sorĉista bastoneto — larĝe malfermiĝas al tiu kiu posedas Esperanton kaj ĝin kunportas en sia vojaĝpakaĵo.

Esperanto kaj telefono

Esperanto lasas sin klare kaj trafe kompari kun la telefono. Imagu ke sole esperantistoj havus telefonon. La praktika valoro de tiu ĉi jam ne malhavebla teknikaĵo estus ege malgranda, preskaŭ nula. Kontraŭe, se ĉiuj kiuj posedas telefonon parolus Esperanton, nia afero jam estus atinginta la finan celon.

Ĉiu nove varbita esperantisto, ĉiu kiu finis elementan aŭ duagradan kurson, esence estas "nova abonanto" en nia internacia "telefonlibro" kaj kontribuas al la plidensigado de nia internacia reto. Daŭre ni varbu novajn "abonantojn". Bedaŭrinde ni ankaŭ perdas konstante iamajn fidelajn "klientojn", tiel ke apenaŭ nia movado kreskas. Se la sama fenomeno prezentigis ĉe niaj grandaj telefonkompanioj, tiu teknika inventaĵo neniam estus akirinta tian gradon de populareco, tian densan disvastiĝon. Sed la kompanioj varbis, propagandis, eluzis ĉiajn komercajn kaj psikologiajn argumentojn por aktive, efike, racie kaj celtrafe "vendi siajn varojn".

En nia movado ni malhavas tiajn "kompaniojn" kiuj — disponante pri fortaj financaj rimedoj — vendas, per lerte argumentitaj frazoj kaj konvinkaj sloganoj, nian "varon", t.e. nian Internacian Lingvon, kies valoro — same kiel ĉe la telefono — ankaŭ kreskas paralele kun la nombro de niaj adeptoj.

Libervole rezigni pri facila vivo

Tiu tasko, peza sed nobla, apartenas al ĉiu esperantisto, kiu konsideras sin vera adepto de la Internacia Lingvo. Tiuj kiuj lernis "iom da Esperanto" nur por interŝanĝi bildkartojn aŭ poŝtmarkojn, fakte ne rajtas inde envicigi sin en niajn rangojn. Esti esperantisto — en la profunda senco de la vorto — signifas: libervole preni sur sin laboron, daŭre kampaji, batali kontraŭ antaŭjuĝoj, misprezentoj, skeptiko, ignoro kaj intenca malico. Esti esperantisto signifas: libervole rezigni pri facila vivo, defendi siajn konvinkojn, maltimi la batalkampon, defii la atakojn kaj trankvile rebati ilin sciante ke niaj argumentoj estas nerefuteblaj, logikaj, klare pripensitaj kaj elprovitaj en jardekoj da praktika sperto.

Sed kiom da esperantistoj tute konscias pri tiu grava devo kiun ili aŭtomate akceptis fariĝinte esperantisto? Ĉu ni ĉiuj estas sufiĉe armitaj por ke ni jetu nin kuraĝe en la batalon? Ĉu vere brulas en niaj animoj la konvinko aŭ ĉu ni prefere retiriĝas el la debato timante ridindigi nin? Al nia afero pli malutilas indiferenta, ŝanceliĝanta esperantisto ol evidenta kontraŭulo. Ni ne toleru ŝanceliĝemon, duonkorecon aŭ indiferentan sintenon. Oni estu POR aŭ KONTRAŬ kaj tiuj kiuj estas por Esperanto, por la ideo de internacia, neŭtrala lingvo apartenas al nia movado, eĉ se ili — pro iu ajn kaŭzo — ne lernis aŭ lernos la lingvon. Ĉiuj kiuj nomas sin esperantistoj aŭ kiuj forte simpatias kun Esperanto, ili sciuj defendi nian aferon per klaraj argumentoj. Kaj ĉi tie mi tuŝas la ĉeftemon de mia artikolo, nome la gravan kaj respondecplenan taskon de la lokaj grupoj kaj rondoj.

La kerno de nia movado — la loka grupo

Elirante de la principo ke ĉiu esperantisto havas grandan taskon kiun li plenumu laŭ siaj ebloj, mi apelacias al la lokaj grupoj por ke ili preparu lin (ŝin) por tiu tasko, havigante al li la argumentojn per kiuj li sin armu. Ĉar esperantisto ne povanta sin defendi adekvate kontraŭ la ordinaraj akuzoj, misprezentoj kaj milfoje aŭditaj malĝustaĵoj rilate al nia lingvo, estas "malbona produktaĵo" de sia grupo. Se pro lia senhelpeco en iom klera diskuto, Esperanto kaj la ideo de internacia lingvo senkreditiĝas, pri tio ĉi ne kulpas unuavice li sed la gvidantoj de la grupo al kiu li apartenas.

Estas ĝuste tiu gravega tasko kiu tiom ofte tute neglektiĝas. Al kio servas Esperanto-kunveno, kie la prezidanto bonvenigas la venintojn, kie poste iu klubano rakontas pri sia libertempo en fremda lando kie li estis gastame dorlotita de la tieaj "gesamideanoj", montras lumbildojn. Poste oni paŭzas, prefere tre longe, ĉar la postpaŭza parto de la klub-vespero estos por mallonge pritrakti kelkajn gramatikajn malfacilaĵojn. Oni kantas la himnon kaj fine sentas sin liberigita de la premanta devo paroli Esperanton. Feliĉe ne estas tiel en ĉiuj grupkunvenoj, sed multege da fojoj la programoj estas tre mezkvalitaj aŭ eĉ de malalta nivelo. Ĉu estas mirige ke la veraj seriozuloj nin forlasas aŭ bojkotas niajn kunvenojn? Ĉu kunvenoj de aliaj movadoj kun mondreforma celo aŭ idealaj tendencoj forpasigas la tempon sammaniere? Anstataŭ plene utiligi la disponeblan tempon por akriigi la spiriton, profundigi scion kaj konon pri lingvo kaj ĝia ekstreme lerniga historio, oni facilanime forbabiladas la valorajn horojn.

(daŭrigo dekstre)

Lastaj progresoj de la subskribo-kolektado


Ci-monate, pro manko de spaco, ni komunikas nur plej koncize la lastajn atingojn. Ĝis la 16-a de marto alvenis en la C.O. subskriboj de 50 630 individuoj kaj de 247 organizaĵoj kun pli ol tri milionoj da membroj. Jen laŭlande la nombro de folioj revenintaj: Arg. 32, Aŭstral. 03, Aŭstrujo 10, Belg. 219, Braz. 17, Brit. 197, Bulg. 103, Cejlono 1, Ĉeĥos. 166, Ĉin. 1, Dan. 113, Finn. 87, Franc. 241, Germ. 522, Grek. 8, Hind. 3, Hisp. 112, Hung. 59, Irl. 2, Israelo 10, Ital. 160, Jap. 1, Jug. 47, Kanado 13, Kongo 5, Koreujo 1, Madag. 6, Malto 3, Meks. 6, Ned. 281, Norv. 1, NZ 2, Pol. 163, Sovet. 9, Sved. 84, Svis. 55, Usono 9, Venez. 4, Vjet. 1. Entute 39 landoj. Kiel oni vidas, en kelkaj kazoj (ekz. Japanujo) la granda distanco malfruigas la alvenon, dum en iuj aliaj tamen la ĝisnuna kolektado neniel spegulas la pozicion de Esperanto en la koncernaj landoj.

Gravaj subskriboj varbitaj dum la pasinta monato estas tiuj de la Internacia Federacio de Laboristaj Vojaĝasocioj (17 landaj filioj),

de la bulgara ministro de agrarmastruma produktado, s-ro Marin G. Vaĉkov, kaj de la bulgara vicministro de agrikulturo, s-ro Penko Hr. Georgiev. En Hispanujo donis sian apogon la rektoro kaj dekanaj de la Universitato de Zaragoza. Eminentaj en siaj landoj estas ankaŭ la urbestroj de Rotterdam kaj de Manchester. Krome subskribis nombro da francaj urbestroj, kaj parlamentanoj danaj, britaj, francaj kaj italaj. En Hindujo subskribis tri tre influaj personoj: s-ro Gopāl Ĉandra Sinhā, membro de la leĝdona komisiono pri oficiala lingvo, kaj sekretario de pluraj kulturaj instancoj, i.a. de la Hindia Literatura Asocio, de kiu Gāndhi estis prezidanto; s-ro Vidjā Bhāskara, sekretario de la Hindustān Akādāmī; s-ro Mōli Ĉandra Šarmā, membro de la komisiono pri oficiala lingvo.

En multaj lokoj oni jam konstatis, ke la kolektado de subskriboj malfermas multajn pordojn al novaj kontaktoj en novaj medioj.

Eluzu la okazon: kolektu nun!



**la jaro de internacia
kunlaboro, jaro de la
int. lingvo esperanto**

LASTMOMENTE

Ĝis 25.3.1965 : 60 108
individuoj kaj 283
organizaĵoj kun
4 400 600 membroj.

(daŭrigo de maldekstre)

Se lokaj grupoj, landaj asocioj, internaciaj Esperanto-kongresoj kunvenas, ili kolektiĝu unuavice por labori kaj la programoj estu "laborprogramoj". La prezidanto de la loka grupo havas la devon zorgeme elekti kaj prepari la erojn de la tagordo, tiel ke ĉiu unuopa programero estu plejeble lerniga, eduka. Tiurilate mi volonte atentigas la organizantojn de klubvesperoj pri la tre interesa, riĉenhava materialo kiun regule publikigas CED. Se ekzemple oni kune pritraktus la CED-dokumenton, verkitan de S-ro Auld sub la titolo "Mitoj kaj Faktoj pri Esperanto" (Dok. A/IV/7), oni ne nur donus al la klubanoj elstarajn argumentojn por defendi Esperanton kontraŭ ŝajne logikaj opozicioj, sed samtempe oni povus utiligi tiun verkaĵon kiel stud- kaj tradukmaterialon, ĉar ĝi estas verkita en bonega, moderna lingvo. Sisteme farante tian traduklaboron, oni aŭtomate posedus nacilingvan tradukon de bonega prozaĵo kun aktuala enhavo, kiun eble volonte akceptus lokaj aŭ nacilingvaj gazetoj aŭ revuoj.

Alia tre rekomendinda materialo por komuna pristudado dum klubkunvenoj estas la de Prof. Lapenna verkita traktaĵo titolita "La Lingva Problemo en Internaciaj Rilatoj" (CED-Dok. A/II/1). Tiu dokumento enhavas tiom da klaraj argumentoj, tian nombron da nerefuteblaj faktoj, tiom da okulfrapaj sed apenaŭ de la granda amaso sciataj evidentaj faktoj pri nia lingvo, ke ĉiu esperantisto ne povas ne esti informita pri tiu gravega dokumento. Sed kiom da esperantistoj konas ĝin aŭ pristudis detale ĝian riĉan enhavon. Generale mi opinias ke ĉio kion CED eldonas, meritas la plenan, sendividan atenton de ĉiuj esperantistoj kaj de ĉiuj kiuj — ne lerninte la lingvon — interesiĝas pri la problemoj de internacia mondlingvo.

Varme mi rekomendas al ĉiuj lokaj grupoj atenteme pristudi kaj pritrakti la CED-dokumentojn, pridiskuti ilian enhavon publike en kunvenoj, argumentadi pri ili en Esperanto kaj nacilingve kun niaj kontraŭuloj, kun lokaj aŭtoritatuloj, gazetaro, ktp. Tiujn kiuj prefere restas ĉe la fonto de nia klasika literaturo, mi atentigas pri la ankoraŭ hodiaŭ aktuala eseo, verkita de D-ro Zamenhof mem komence de la jaro 1900-a "Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia" (Vidu "Originala Verkaro", paĝoj 276 ĝis 312). En ok klaraj, larĝe argumentitaj ĉapitroj, D-ro Zamenhof, en sia neimitebla maniero, disvolvadas siajn teoriojn kaj kondukas la leganton al neeviteblaj, logike konstruitaj konkludoj favoraj al Esperanto. Multaj skeptikuloj pri la vivebleco kaj efektivebleco de internacia lingvo ĉirkaŭ la jaro 1900-a plene konvertiĝis al Esperanto post legado de tiu ĉi traktaĵo. Hodiaŭ ĝia enhavo ankoraŭ estas treege leginda kaj multaj admirantoj la sagacajn, klarvidajn spiritojn de Zamenhof, kiu akre analizas, antaŭvidas, profetas kaj anticipe refutas per majstre konstruita plejado.

Se tiuj kiuj respondecas pri la tagordo de la klubkunvenoj, decidus ŝanĝi la kutiman programon, igante ĝin pli instrua, pli alt-nivela, pli konforma al la batalema spirito kiu ĉiam regu en nia esperantista vivo, oni eble perdos kelkajn anojn. Sed tio tute ne gravas ĉar tiuj kiuj forkuras pro tiaj motivoj neniam alportos ion ajn pozitivan al nia movado. Kontraŭe ni altiros novajn elementojn, multe pli seriozajn, homojn kiuj pretas plenumi sian laboron, la laboron al kiu ĉiu vera esperantisto libervole sin devigis.

E. L. M. Wensing,
Vicprezidanto de U.E.A.

**esperanto
aprilo 1965**

LA 50a VOLUMO DE STAFETO



El la unua kvindeko

Personoj lernintaj la Internacian Lingvon dum la pasinta jardeko apenaŭ povas konscii, kiel malabunda estis ĝia literaturo en la unuaj postmilitaj jaroj: nek ĝis kia grado la nuna reflorado ŝuldiĝas al la streboj de unu homo: Juan Régulo Pérez.

En 1952 unu libro kaŭzis sensacion; temis pri *Kvaropo* de W. Auld, J. S. Dinwoodie, J. Francis kaj R. Rossetti. Krom la escepta poezia valoro de *Kvaropo*, en la volumo montriĝis aliaj trajtoj, ĝis tiam ne ofte renkonteblaj, kunigitaj, en niaj libroj: profunda respekto por la lingvo, faksperta arango de la tipografiaj detaloj, bela vesto... Resume: libro farita kun amo kaj kompetento.

Per *Kvaropo*, mejlŝtono de nia literaturo, debutis STAFETO. Kaj de jaro al jaro, per la daŭra aperigo de verkoj, elektitaj laŭ rigoraj kriterioj lingvaj kaj artaj, STAFETO firmiĝis kiel la plej fama eldonejo de nia lingvo, vera daŭriganto de la neforgesebla Literatura Mondo, kies staturon STAFETO jam signife superis.

Kvin-ses proponoj monate

Apenaŭ estas sondebla la transcendo de STAFETO en nia Movado kaj en la futuro de nia lingvo. Ĝia nura ekzisto tiel spronas niajn beletristojn, ke proksimume kvin aŭ ses eldon-proponoj de originalaj aŭ tradukitaj verkoj alvenas ĉiumonate al STAFETO; nun, la aŭtorojn ne retenas la penso, ke iliaj manuskriptoj senhelpe ŝimos en tirkesto. Aliparte la severaj lingvaj postuloj de la eldonejo kunhelpas la disvastigon de pli matura, esprimiva, nuancita Esperanto, tiel, ke oni eĉ povus paroli pri ia STAFETO-skolo, kiu inkluzivus la pli grandan parton de niaj beletristoj. En inter-influo fekunda por la progreso de Esperanto, al la pozitiva agado de STAFETO respondas la pozitiva reagado same de niaj famaj verkistoj, kiel de novaj talentoj. Krome, la imponaj serioj de STAFETO akiras por Esperanto la respekton de kelkaj rondoj, kiuj, se ne tute kontraŭis nian lingvon, tamen ĝin rigardis skeptike, pro ĝia

malabundo de solidaj fruktoj kaj svarmo da diletantaĵoj. Certe, de tempo al tempo, iuj altnivelaj verkoj jam antaŭe sin trudis al la atento de tiuj rondoj, por kiuj, tamen, unu hirundo printempon ne alportas.

Revua trarigardo

Ci tiu STAFETO, kies libroj superas la mezan valoron kutiman en nia literaturo, kaj ne malofte atingas pintojn tre altajn, alvenis, kun prava memkontento, al signifa stadio de sia ekzisto: la eldono de sia *kvindeka volumo*. Per ĝi, *Sur la vivovojo* de A. Logvin, STAFETO kulminigas dekdujaran vivon, kies disvolviĝo meritas revuan trarigardon, eĉ se nur por konstati, kiom pli riĉaj je belo, kulturo, arto kaj lingvo ni fariĝis ekde 1952.

Kvazaŭ ĝi kolektadus fortojn por posta impeto, dum la unuaj jaroj STAFETO apenaŭ produktas kvante. Post *Kvaropo*, ĝia sola libro en 1952, STAFETO regas nin en 1953 per nur unu libro en la tiel nomata "Belliteratura Serio": *La bapto de caro Vladimir* de K. Havlíček Borovský, en mirinde absorba elĉeĥigo de T. Pumpr.

Post dujara paŭzo, en 1955 STAFETO eldonas tri titolojn: *El la maniko* de R. Rossetti, *Koko krias jam!* de F. Szilágyi kaj *Kontralte* de M. Boulton: tri perlojn de nia literaturo.

STAFETO atingas duoblan sukceson per la du libroj de 1956: *Eseoj* de G. Waringhien kaj *La infana raso* de W. Auld: per ili STAFETO plu rivelas la mirindan riĉon de nia propra kulturo, tiel, ke, apud konsekritaj aŭtoroj, aperas aliaj kun surprize matura talento.

En 1957, krom la atentinda *Jozefo* de J. D. Applebaum, STAFETO eldonas la tradukon de *La floroj de l' malbono* de Ch. Baudelaire, plenumitan de la majstroj K. Kalocsay kaj G. Waringhien: por la unua fojo Esperanto





Juan Régulo en sia kabineto legas presprovaĵojn.

havas la kompletan poemaron de fama klasi-kulo, en traduko, kiu superas forme kaj enhave la transdonojn de la sama verko en la gentajn lingvojn. En tiu jaro STAFETO inaŭguras la tiel nomatan "Popularsciencan Serion", per la publikigo de la baldaŭ poste renoma titolo *La vivo de la plantoj* de P. Neergaard, jam tradukita en ok naciajn lingvojn el la Esperanta originalo.

1958 estas la jaro de la grandioza *Esperanta Antologio* de nia originala poezio, en redakto de W. Auld, kaj de la bela lirika komedio de J. Baghy *Sonĝe sub pomarbo*.

Du novaj branĉoj

En 1959 la ritmo akceliĝas; de la STAFETO-arbo diskreskas du novaj branĉoj: unu, la serio "Movado", kiu debutas per la trezora esperantologia esearo *Lingvo kaj vivo* de G. Waringhien; la alian branĉon, "Beletraj Kajeroj", inaŭguras *Ŝtupoj sen nomo* de B. Ragnarsson kaj *Pinta krajono* de R. Rossetti. Al la "Popularsciencan Serio" kontribuas T. Sekelj per *Nepalo malfermas la pordon* kaj L. Tell per *La bela subtera mondo*. Plie en la "Belliteratura Serio" aperas *Eroj* de M. Boulton. Sume ses libroj, kiuj signas epokon en la historio de nia literaturo.

La jaro 1960 rompas la rekordon de 1959. Kvar registroriĉajn titolojn donas al ni la serio "Beletraj Kajeroj": *Nur tri kolorojn* de E. Urbanová, *Vitrilo* de J. Francis, *Junaĝa verkaro* de E. Privat kaj *Unufingraj melodioj* de W. Auld. Tri librojn la "Belliteratura Serio", nome *Reĝo Edipo* kun *Antigona* de Sofoklo en viva traduko de D. B. Gregor, *Topaze* de Pagnol plus *La ŝipego "Tenacity"* de Vildrac en bela kaj flua elfrancigo de R. Bernard kaj *Otelo* de Shakespeare, atuto de nia tradukarto ŝuldita al R. Rossetti.

En 1961, en la serio "Movado", STAFETO eldonas la skuan *Simpozio pri -ata/-ita*, kaj en la serio "Beletraj Kajeroj" poezian kaskadon: *Ombroj de la kvara dimensio* de E. de Kock, *Reeĥoj* el 19 jugoslaviaj poetoj, *Nova Ezopo* de S. Urban kaj la juvelan *Proverbaro Esperanta* de Zamenhof.

Ankaŭ en la sekva jaro, 1962, la presmaŝinoj de STAFETO ne haltas. En "Beletraj Kajeroj" aperas la satira, humura pastĉaro *Specimene* de H. Baupierre, la faka studaĵo *Planlingvaj problemoj* de W. Gilbert, *La profeto* de Gibran en traduko de R. Orloff Stone, la polemikaĵo *Elingita glavo*, la cignokanto *Ekzilo kaj azilo* de I. Baranyai, la lirikaĵo *Provo alfronti la vivon* de I. St. Georgiev. La serion "Movado" pliriĉigas Zamenhof, aŭtoro de *Esperanto* de M. Boulton, lia ĝisdata plej kompleta biografio, pie verkita.

La stilmajstra romano de R. Schwartz *Kiel akvo de l' rivero*, la dua eldono de *Homoj sur la tero* de S. Engholm en la "Belliteratura Serio", plus la eventoplenaj *Aventuroj de pioniro* de E. Privat, *Vivo kaj opinioj de majstro M'saud* de la bedaŭrata lingvartisto J. Ribillard, la sensacia *Duonvoĉe* de tiu mistera panamano G. E. Maura, la pipra kaj paprika *Sen paraŝuto* de P. Thorsen kaj *Sub stelo rigida* de Thorsteinn frá Hamri en alt-literatura interpreto de lia samlandano B. Ragnarsson, ĉiuj en "Beletraj Kajeroj", jen la garbo, kiun STAFETO plukis por ni en 1963.

Kaj, fine, 1964, jaro en kiu STAFETO aldonas tri gemojn al sia diademo: *Soifo* de L. Tárkony, *Hamleto* de Shakespeare, fidele tradukita de L. N. M. Newell, kaj 33 *rakontoj*, antologio de niaj originalaj noveloj en redakto de R. Rossetti kaj F. Szilágyi, la tri en la "Belliteratura Serio". Plie la amare ironia *Maŝinmondo* de S. Szathmári, la debuta, sonĝeca *El tero kaj etero* de J. Pióro, same kiel la 50a libro, la tenera, sopira *Sur la vivo-vojo* de A. Logvin, pliriĉigas la serion "Beletraj Kajeroj".

Kvankam konsiderinda kvanto de tiuj kvindek libroj, kun proksimume 10.500 paĝoj, estas vendata en Francujo, Nederlando, Japanujo, Britujo, Svedujo... ili atingas ĉiujn partojn de la mondo. Ja prave, ĉar prozistoj kaj poetoj, viroj kaj virinoj el 32 diversaj landoj de ĉiuj kontinentoj, kontribuis ĝis nun originalajn kaj tradukitajn verkojn al la serioj de STAFETO.

Naŭ jam elĉerpitaj

La plimulto de la titoloj estis presita en 1.000 ekzempleroj; pluraj, inter ili ĉiuj titoloj de la "Popularsciencan Serio", en 2.000, kaj kelkaj, kiam la cirkonstancoj tion konsilis, en pli ol 2.000. Taŭga organizo por disvendi nian literaturon en internacia skalo permesus al STAFETO kelkobligi siajn eldonnombrojn, sed tia organizo estas ankoraŭ "muziko de la



futuro". Malgraŭe estas jam elĉerpitaj la naŭ unuaj numeroj de la "Belliteratura Serio", pluraj aliaj preskaŭ elvendiĝis, kaj en tiu libromarkato, kies strukturon ni devus refandi aŭ krei dekomence, nun *Aventuroj de pioniro* kaj *Kiel akvo de l' rivero* plej bonritme debitiĝas.

Kelkaj opinias, ke entrepreno kiel STAFETO povis stariĝi kaj antaŭeniri dank' al solidaj financaj bazoj. Tute erara opinio! STAFETO estas objektiva miraklo de la fervoro, sindono, kapablo kaj klero de Juan Régulo Pérez, kiu apenaŭ disponas malriĉe ekipitan presejon — eĉ linotipon ĝi ne havas — kaj financas la eldonon de siaj verkoj per la enspezoj, kiujn iom post iom havigas la vendado de la jam aperintaj STAFETO-libroj. Por publikigi *Kvaropo*, S-ro Régulo ne malmulte enŝuldiĝis, kaj liaj tiamaj ekvilibroj sur la financa ŝnuro estis tiel spirretenaj, ke profesia ŝnurdancisto certe deklarus lin nesuperebla.

Tamen, subtenate de sia konvinko — cetere prava —, ke lingvo sen literaturo estas nevivopova, Régulo ne ripozas sur la jam kolek-



El la *Popularscienca Serio* de Stafeto, du titoloj jam estas el Esperanto tradukitaj en plurajn naciajn lingvojn. Jen, maldekstre, la originala "*Nepalo malfermas la pordon*" de Tibor Sekelj, kun ĝiaj eldonoj angla, serbakroata kaj slovena; dekstre, "*La vivo de la plantoj*" de Paul Neergaard, kun la eldonoj pola, dana, litova, finna kaj serbakroata.

titaj laŭroj, kiel *Kvaropo*, *La infana raso*, *Esperanta Antologio*, *Eseoj*, *Lingvo kaj vivo*, k.a.; kontraŭe, li diligente plikonstruas sian STAFETO-fortreson, kies libromurojn jam nenio povos renversi. Tial, krom lia eksterordinare ordinara laborado, novaj kaj gravaj konstrublokoj baldaŭ estos masonitaj: mi antaŭsuforu la jam komencitan planadon de *Tutmonda Sonoro*; *Historio de la Esperanta literaturo*; antologio de niaj originalaj eseoj; fortika, dokumenta libro pri la historio kaj decidoj de la Akademio de Esperanto... kaj iam, kiu scias, eĉ la glora kavaliro *Don Kiĥoto*, verdrile vestita, ekrajdos el la donkiĥoteska STAFETO-kastelo. Iam...



Donkiĥotismo

Multaj, evidentaj motivoj pravigas tiun aplikon de la epiteto *donkiĥoteska* al STAFETO-JUAN RÉGULO. Nur unu ekzemplo: kun absoluta ignoro de ĉiuj komercaj principoj, J. Régulo publikigas iajn librojn, pri kiuj li antaŭscias, ke ili tre malfacile vendiĝos; sed sufiĉas nur ke tiuj libroj, laŭ lia kriterio, povas iel riĉigi nian literaturon, iel signifi pozitivan kunhelpon al Esperanto, por ke nia brava eldonisto senhezite revenu al siaj familiaraj ekvilibroj, sed kun la intima, profunda ĝojo, ke nia lingvo fariĝos ankoraŭ pli riĉa, ke la Esperanto-kulturo pludisbranĉiĝos, kaj, ke nia movado daŭre aŭtoritatiĝos. Tiel okazas, ekzemple, kun la avangarda poezio, por multaj hermeta, kaj kun kelkaj el la versaj teatraĵoj. J. Régulo bone scias, ke tiu manko de notinda sukceso en la merkato ŝuldiĝas ne al manko de gravo, signifo aŭ beletra valoro, sed al la fakto, ke ĉie, same en Esperanto kiel en la gentaj lingvoj, tiajn verkojn kapablas ĝuste taksati por la movado nur negranda legantaro.

En mondo, kiu avidas ĉiam pli kaj pli da prospero dank' al sia amasproduktado kaj amaskonsumado, tiu hereza, bankrot-riska komercosistemo de J. Régulo havas sian nomon: donkiĥotismo. Tamen, ne nur per la literaturo, sed ankaŭ per la donkiĥotoj — ĉu Zamenhof ne estis *nia* genia, pratipa Don Kiĥoto? — Esperanto naskiĝis, progresas — kaj venkos.

Fernando de Diego

La Laguna, kun 60.000 loĝantoj, estas la iama ĉefurbo de Kanarioj, kaj ankoraŭ la kultura centro. La foto montras la universitatan kvartalon, kie troviĝas la sidejo de Stafeto.



Apud la Sokokuĵi-Templo en Kioto troviĝas la laborejo de Ŝokusai Hajakaŭa IV, konata kiel bambuo-artisto. Tiu ĉi arto originis en Kansai-Distrikto, kaj ĉirkaŭ Kioto, kie estas trovebla la plej bonkvalita bambuo. La metio havas longan tradicion: Ŝokusai I estis la filo de militisto el la regiono nun nomata Fukui, kiu iris al Kioto en la tempo de la Meĵi-Restarigo. Bambuoverko estis en tiu tempo nur kopio de ĉinaj teknikoj, sed Ŝokusai evoluigis sian stilon kaj iniciatis la kutimon surmeti sian nomon sur siajn verkojn. Oni povas diri ke li estis artisto de la transira periodo, kiam la bambumetiistoj fariĝis artistoj.

La bambuo estas tranĉata unu fojon en la jaro, en decembro kaj januaro, kaj nur la trunkoj kun longeco de pli ol 2 m. de la tria artiklo estas konvenaj. Vegetajaj tinkturoj, la internajo de prunarbo kaj la suko de la ŝelo de sambuko, estas uzataj por kolorigi la finitajn verkojn. La verkoj havas longdaŭran vivon. Bambua verko, kiu estas pli ol 2000-jara, troviĝas en korea muzeo. Ŝokusai IV estas muzikamanta kaj granda admiranto de la verkoj de Piet Mondriaan. Li opinias ke ekzistas parenceco inter la formigo de bambuverkoj kaj bonaj muziko kaj pentraĵo.

El "This is Japan" tr. G.G.P.

M U Z I K O E N L I G N O



ALFABETOJ KREOTAJ POR KVIN AFRIKAJ LINGVOJ

Alfabetoj estas kreotaj por kvin ĝis nun nur parolataj afrikaj lingvoj en la respubliko Nigerio, sude de Saharo. La alfabetigon de ĉi tiuj lingvoj entreprenos eminenta filologo, s-ro Pierre F. Lacroix, profesoro en la Lernejo de Orientaj Lingvoj en Parizo kaj lekciisto en Sorbonne. Unesko sendos lin al Nigerio pro invito de la nigera registaro lige kun la nacia kampanjo kontraŭ analfabeteco. Estas la unua fojo, ke Unesko helpas al afrika nacio, surpaperigi la sonojn de iu loka lingvo, buŝe transdonitajn tra sennombraj antaŭaj generacioj.

Reveninte el la nigra ĉefurbo Niameo post esplora vizito, s-ro Lacroix klarigis ĉe Unesko siajn celojn.

"La nigra registaro", li diris, "jam de 1962 kampanjas helpe de Unesko por forigi analfabetecon. Ĝi opinias, ke al plenaĝuloj estas preferinde instrui legadon kaj skribadon unue en la afrikaj lingvoj, ol en iu t.n. 'internacia'. En la lernejoj la infanoj lernas legi kaj skribi la oficialan lingvon: la francan. Jam por ili tio estas malfacila, ĉar de la gepatroj ili ensorbis afrikan lingvon. Des pli malfacile estus por plenaĝuloj."

La kvin lingvoj, kiujn s-ro Lacroix vivigos sur papero, estas la haŭsa, la peŭla, la songhaja-ĵerma, la tamaŝaga kaj la kanuria. Por la unuaj tri sufiĉos proksimume sama alfabeto, dum la tamaŝaga kaj kanuria, parolataj de la nomadaj tuaregoj en Saharo, postulos kelkajn modifojn. La skribigo de tiuj lingvoj servos ne nur por leginstruo, sed ankaŭ por librigi la tradiciajn literaturaĵojn — versaĵoj, historiaj epopeoj, k.a. — kiuj en kelkaj okazoj ekzistas buŝe jam de la 15-a jarcento p.K.

Misiistoj uzis eŭropajn sistemojn

S-ro Lacroix, kiu ankaŭ pli frue vivis kaj laboris en Afriko sude de Saharo, havas freŝan, sciencan sintenon al siaj problemoj. Antaŭe, li klarigis, la afrikajn lingvojn alfabetigis plejofte misiistoj kaj lingvistoj, kiuj uzis eŭropajn fonetikajn sistemojn ne ĉiam adekvatajn al la parolsono. Krome okazis diferencoj inter la skribsistemoj de angloj kaj francoj: angloj, ekzemple, skribas *Hausa*, dum la francoj *Haoussa*. "Afrikaj lingvoj", klarigis s-ro Lacroix, "uzas tonajn distingojn pli ol eŭropaj lingvoj. Ili posedas iujn sonojn unikajn, plejparte gorgajn kaj glotajn. Tonoj kaj tonarangoj estas tre gravaj. Sonkombinoj povas havi du tri diversajn signifojn depende de la tono. Ekzemple, la haŭsa vorto *gindi*, prononcata kun alta tono je la unua silabo, signifas bazon aŭ fundamenton, sed kun malalta tono je tiu sama silabo, katenon. Tiel, memevidente, ne eblas sukcese alfabetigi afrikajn lingvojn, se oni uzas pure eŭropan skribsistemon."

Por krei siajn alfabetojn, s-ro Lacroix projektas uzi unu el la du internacie rekonitaj simbolaroj, nome tiun de la Internacia Asocio de Fonetiko, krome nomata la sistemo Passy. Ĝi konsistas el la baza 26-litera latina alfabeto, plus deko da ekstrapaj literoj speciale adaptitaj por prezenti afrikajn parolsonojn. Ekzemple la litero *b* prezentas la kutiman sonon. Sed *b* kun hoko ĉe la vertikala streko prezentas similan sonon produktatan en la gorgo per preskaŭa fermo de la gloto. La samo validas pri *d*, *k*, kaj iuj aliaj sonoj. Simile al la araba, la negrafrikaj lingvoj havas multe da glotaj sonoj produktataj en la gorgo.

Novaj vortoj neniam skribitaj

S-ro Lacroix menciis, ke la haŭsan lingvon parolatan en la najbara lando Nigerio oni alfabetigis jam antaŭ 40-o da jaroj uzante iujn el la literoj de la sistemo Passy. "Sed estas malfacile", li aldonis, "adopti tiun alfabeton por la uzo de la haŭsoj en Nigerio, kiuj parolas malsamajn dialektojn ofte en distanco de nur 10 ĝis 20 kilometroj. Krome, al la nigria sistemo mankas simboloj por iuj sonoj, precipe konsonantoj, kaj ĝi ne indikas la vokallongecon nek la tonaltecon. Fine, la haŭsa lingvo tiom evoluis kaj kreskis, ke multaj novaj vortoj neniam ankoraŭ estis skribitaj. Samtempe multe evoluis nia lingvistika scio. La sistemo Passy tamen sufiĉe similas la nigerian sistemon por ebligi kulturajn kontaktojn inter la haŭsoj en la du landoj."

Aperos bazaj vortaroj

S-ro Lacroix pasigos tri monatojn en Nigerio por fini sian alfabetigon. Poste li petos la nigeran registaron eldoni bazan vortaron (ĉ. 3000 vortoj) en ĉiu el la tri ĉefaj lingvoj: la haŭsa, la peŭla kaj la songhaja-ĵerma. Tiuj vortaroj servos por baza instruado dum la leginstrua kampanjo. La 3000 vortoj, laŭ s-ro Lacroix, ampleksos ĉ. 90% el ĉiuj vortoj uzataj en ĉiutaga vivo. Por aldoni modernan guston, s-ro Lacroix intencas enskribi ankaŭ kelkajn vortojn el aliaj lingvoj, kiel "aeroplano", "trajno", "elektro". La haŭsoj jam havas proprajn esprimojn por "aeroplano" kaj "trajno": nome, "fluga kanuo" kaj "tera kanuo". Por elektro kaj aliaj modernaj eltrovaĵoj ili pruntas vortojn el la araba kaj el eŭropaj lingvoj.

Unu el la plej gravaj elementoj en ĉiu kampanjo kontraŭ analfabeteco estas havigo de facilaj legaĵoj por eklegantoj. La adopto de latin-speciaj literoj por tiuj lingvoj faciligos la akiron de presiloj por produkti simplajn legolibrojn kaj por presi en ĵurnaloj specialajn paĝojn por ĵuslernintaj plenaĝuloj.

(UNESCO FEATURES)

Kun intereso ni legis en la decembra numero de "Esperanto" la artikolon koncerne la skribon de la propraj nomoj.

Inter la diversaj proponoj, la plej taŭga ŝajnas al ni la plena majuskligo de la familia nomo (aŭ, pli bone, de tiu ĝia parto, kies komenco difinas la alfabetan ordon: VAN DEN OEVER, van EEDEN, DE AMICIS), kaj la majuskla komenclitero por la persona nomo. Tiu metodo lasus kompletan liberecon koncerne la sinsekvon de la personaj kaj familiaj nomoj, respektante tiel la apartajn kutimojn de la diversaj landoj. Vi diras, ke tio donas malegalan aspekton, se en iu teksto troviĝas multaj nomoj, sed tiu afero estus malpli grava ol la klareco; krome, se la nomoj estas ofte ripetataj, oni povus eventuale uzi la komplete majusklan familian nomon, kiam ĝi estas citita unuafoje, kaj poste uzi nur la majusklan komencliteron. Ĉe manskribo, oni povas egale skribi la familiajn nomojn tute per majuskla presliteroj (kiel cetere oni faras ofte, kiam oni volas, ke iuj difinitaj vortoj estu klare kompreneblaj) aŭ substreki ilin.

Ŝajnas al ni neakceptebla la lasta propono (nome: rezervi la majusklan komencliteron sole por la nomoj difinantaj la alfabetan ordon: william Shakespeare). Antaŭ ĉio la persona nomo sen majuskla komenclitero estas nekutima en multaj lingvoj; krome tio povus esti kaŭzo de miskompreno, ekzemple, kiam oni uzas nur la familian nomon, kaj tial tuj posta aŭ tuj antaŭa senmajuskla vorto tute ne estas la persona nomo, sed iu vorto de la kunteksto (kiu povus hazarde koincidi kun iu persona nomo).

Carolina kaj Luigi Minnaja
Roma, 20 decembro 1964

Mi voĉdonas por *esperanta ordigo* en la uzado de la nomoj. Tio ĉi evidentigas per la lasta loko de la familia nomo. La unua estu rezervita por la persona nomo. Ĉiuj ceteraj lokiĝu inter la du nomoj: persono kaj familia. Ekzemple: Vladimir Iljiĉ (Uljanov) Lenin.

La strukturoj de la diversaj naciaj lingvoj ĉe la nomoj de la homoj restu iliaj problemoj kaj ne lasu postsignon en Esperanto.

Georgo Csüllög
Hungarlando, 12 jan. 65

Kun granda intereso mi legis vian proponon pri la nomoj.

Mi ĝoje akceptas kaj petas ke vi tian sistemon propagandu, ankaŭ al japanaj maljunuloj, kiuj obstine skribas sian nomon spite la nacian karakteron kiel: Hideo Yagi. Jes, mi tre interesiĝis ... ĉe la kompilado de El Japana Literaturo (antologio el noveloj kaj dramoj lastatempaj). Cetere mi devas kondiĉi, ke oni rajtas uzi ankaŭ tian sistemon, kiun mi uzis en Rakontoj de Oogai. Nome, skribi Mori Oogai, sed kun malgrandaj majuskloj ĉe "ori". Ŝajnas al mi (prave! — noto de la red.), ke

via presejo ne disponas tiujn literojn. Ankaŭ tiun sistemon mi uzos en la menciita kolekto. Do, mi uzos de nun por la gazetoj tiel:

Miyamoto masao
Oosaka, 27 jan. 65

RESUME

Unue ni dankas al ĉiuj, kiuj bonvolis esprimi sian opinion pri ĉi tiu problemeto. Post zorga konsidero ni atingis jenajn konkludojn:

1. Sur aliĝiloj, leteroj k.s. jam estiĝis la bona kutimo, skribi per majuskloj la nomon, kiu difinas la pozicion en la alfabeto: William SHAKESPEARE. Alia bona ebleco estas substreki la koncernan parton. Tia kutimo multe helpas la administrantojn.

2. Por la revuo "Esperanto", aliflanke, ni tamen opinias, ke ofta majuskligo estas ĝena. Oni povas konstati, ke ĉe la plimulto de popoloj la lasta nomo difinas la alfabetan ordon. Ĉiujn tiajn nomojn ni do intencas presi en la revuo "Esperanto" senŝanĝe: William Shakespeare, Günther Becker, ktp.

3. En kelkaj landoj, tamen, kies nacia kutimo estas alia, ekzistas forta rezisto kontraŭ tiu ordo de la nomoj. Tial, por indiki en "Esperanto", ke la lasta nomo estas persona nomo kaj la unua nomo la familia, ni ĉiam komencos la personan nomon per minusklo: Maŭ zedong, Konisi gaku, Petöfi sándor. Tiel la legantoj scios, ke en tiuj kazoj la lasta nomo ne difinas la alfabetan pozicion. Ke tiaj personaj nomoj sen majusklo povas kaŭzi miskomprenojn, tion ni ne multe timas, ĉar jam en multaj nacilingvaj alfabetoj ne ekzistas majuskloj, kaj la propraj nomoj estas per nenio distingataj disde ordinaraĵoj, krom per la kunteksto.

4. En iuj landoj ekzistas familiaj nomoj, kiuj konsistas el du aŭ pluraj elementoj: Juan Régulo Pérez. Por indiki, ke en tia kazo la ĉefa nomo estas ne Pérez, sed Régulo, kaj ke sekve ĝi aperu en alfabeto listo sub la litero R, ni intencas ekde nun presigi la plurelementajn familiajn nomojn kun streketoj: Juan Régulo-Pérez, Karel Van-Den-Oever, Edmondo De-Amicis. Tiu aldono estas ja tre malgranda, kaj tamen forigos multajn konfuzojn.

5. El ĉio ĉi sekvas unu simpla regulo, nome, ke en la revuo "Esperanto" la ĉefa, alfabetiga nomo estas la lasta nomo, kiu komenciĝas per majusklo kaj sekvas spacon: William Shakespeare, Miyamoto masao, Juan Régulo-Pérez. El tio sekvas, ke ĉiuj ceteraj nomtipoj ne menciitaj povas resti tute senŝanĝaj: Ivan Minĉev Vazov, Aŝvinikumar', Zekun, Honoré de Balzac, Nguyen van Kinh, ktp.

6. Fine ni emfazas, ke ĉi tiuj reguloj celas nur ebligi al la legantoj, ĝuste kompreni kaj uzi la fremdajn nomojn. Ili neniel celas trudi novajn kutimojn al individuoj aŭ al aliaj eldonaĵoj. — Red.

UEA KANDIDATO POR LA NOBEL-PACPREMIO 1965

Laŭ la informoj kolektitaj en CED ĝis la 4-a de marto, entute 257 kvalifikitaj personoj kandidatigis UEA al la Nobel-Pacpremio por la jaro 1965. La proponintoj apartenas al jenaj 19 landoj: Belgujo, Britujo, Bulgarujo, Danlando, Finnlando, Francujo, Grekujo, Hispanujo, Italujo, Jugoslavio, Kanado, Kongo, Koreujo (Suda), Nederlando, Norvegujo, Pollando, Svedujo, Svislando kaj Urugvajo.

Inter la proponintoj troviĝas 72 svedaj parlamentanoj, 60 nederlandaj parlamentanoj (preskaŭ duono de la Nederlanda Parlamento), 28 finnaj parlamentanoj kaj nombro da parlamentanoj el aliaj landoj. Inter la proponintoj troviĝas, plue, membroj de Sciencaj Akademioj, rektoroj kaj profesoroj universitataj, ministroj kaj estintaj ĉefministroj kaj ministroj, ktp., ĉiuj elstaraj, ofte mondfamaj personoj sur la kampoj de politiko, filozofio, juro, artoj kaj sciencoj.

Estas menciinde, ke la 72 svedaj parlamentanoj apartenas al diversaj partioj: Socialdemokrata, Centra, Popola kaj Komunista. Same tiel la 60 membroj de la Nederlanda Parlamento, inter kiuj troviĝas 2 estintaj ministroj kaj 1 estinta ŝtatsekretario, apartenas al diversaj partioj: Katolika Popola, Laborista, Liberala, C.H.U. kaj A.R.P. (2 protestantaj kristanaj partioj) kaj Pacifista Socialista Partio. Ankaŭ la parlamentanoj de aliaj landoj apartenas al diversaj partioj, kio montras ke la rolo de la Internacia Lingvo kiel instrumento de amikaj rilatoj inter la popoloj kaj la porpaca laboro de UEA estas egale aprezataj de personoj kun malsamaj politikaj konceptoj.

En la gazetoj de diversaj landoj aperis multaj informoj pri la kandidatigo de UEA. Laŭ la informoj publikigitaj en la finnaj gazetoj de la 4-a de februaro, 5 norvegaj parlamentanoj kaj "aro da svedaj" kandidatigis por la sama premio s-ron U Thant, la Ĝeneralan Sekretarion de Unuiĝintaj Nacioj. La Komitato en Oslo faros sian decidon fine de 1965.

ESPERANTLINGVAJ RADIO-ELSENDOJ EN 1964

Laŭ la statistiko, kiun ellaboris la kunlaboranto de CED por la radio, s-ro G. Larglantier, la nombro de ĉiuj radio-elsendoj en 1964 estis entute 1622 kompare kun 1701 en la jaro 1963. La elsendoj daŭris entute 518 horojn kompare kun 534 horoj en 1963. La nombro de stacioj estis 22 el 11 landoj kompare kun 20 stacioj el 13 landoj en 1963. La malkresko ŝuldiĝas al la malapero de 52 elsendoj el Parizo kaj 52, el Koreujo. Aliflanke, aldoniĝis 3 pliaj stacioj en Brazilo kaj Beograd en Jugoslavio. CED antaŭvidas, ke en 1965 la nombro de elsendoj denove kreskos pro la disaŭdigoj de Pekino du fojojn semajne dum entute unu horo ĉiusemajne, kio vaste kompensas la ĉesigon de la elsendoj de radio Bern.

Donacoj por CED

	£	ŝ	p
La stato de la 31-a de januaro 1965 .	10-	4-	0
Gesinjeroj Laurie, Britujo	2-	0-	0
S-ro E. F. Dean, Britujo	5-	0-	0
S-ino J. W. Langtree, Britujo	-10-	0	
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	-10-	4	
E. S., Usono	3-	11-	5
Gesinjeroj Sly, Britujo	5-	0-	0
S-ro R. Slot, Nederlando	1-	10-	0
Gesinjeroj Holmes, Britujo	3-	0-	0
S-ro W. Spaander, Nederlando	-10-	0	
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	-10-	4	

La stato je la 4-a de marto 1965 . . . 32- 6- 1

Tutkoran dankon al ĉiuj donacintoj. Donacojn por CED akceptas la C.O. de UEA, ĉiuj ĉefdelegitoj aŭ perantoj, aŭ la oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.

EN LA GRUPOJ

Jen kelkaj sugestoj por agado de lokaj grupoj dum la venontaj monatoj:

1. *Dissendi poŝte la subskribo-foliojn* por la Propono al Unuiĝintaj Nacioj, al tiuj klubanoj, kiuj pro okupiteco aŭ aliaj kaŭzoj ne povas viziti la kunvenejon (prefere aldonante cirkuleran instigon al kolektado).

2. *Komune traduki la artikolon* "Alfabetoj kreotaj por kvin afrikaj lingvoj" (p. 67) en la nacian lingvon — precipe se ĝi estas lingvo malmulte konata eksterlande — kaj laŭeble aperigi en neesperanta gazeto. Poste sendi specimenojn de la gazeto al: Unesco Features,

Place de Fontenoy, Paris 7e, Francujo, substrekinde ruĝe la indikon, ke temas pri traduko per Esperanto el UNESCO FEATURES.

3. *Aranĝi komunan ekskurson*, ekzemple al muzeo, zoologia ĝardeno, aŭ fabriko, sub gvido de klubano-fakulo, por lernigi al la grupanoj la koncernajn fakajn terminojn, nomojn de bestoj ktp.

4. *Proponi al iu alia organizaĵo*, ekzemple UN-klubo, komunan kunvenon kun prelego kaj diskuto pri la lingva problemo. La proponon oni povas motivi per la sugesto de Unuiĝintaj Nacioj, speciale atenti en la agado de la Jaro de Internacia Kunlaboro la jenajn temojn: komunikado (en majo), edukado (en junio), turismo (en julio).

Hamleto, princo de Danujo, de William SHAKESPEARE. Tr. L. N. M. NEWELL. Eld. Stafeto, La Laguna 1964. 251 p. 22 × 16 cm. Prezo: 9,10 gld. (36,4 st).*

Traduki kaj ree traduki la plej malfacile tradukeblan kaj belegan dramon de Shakespeare estas afero natura kaj konsilinda ĉe ĉiu vivanta lingvo. Sed tiu nova tradukado de HAMLETO en la internacian lingvon, post la majstra laboro de D-ro L. Zamenhof, estis tiom akra, kiom ĝi indas nian laŭdon pro ĝiaj brila sukceso kaj konsiderinda kontribuo por nia literatura trezoro. Per tre serioza strebado, L. N. M. Newell trafis sian celon redoni ĝis la maksimuma grado la precizan signifon, la ekzaktajn nuancojn, la tropojn, la individuan guston, la unikan belecon de la originalo. Tiu ĉi Esperanto-teksto povus konkuri pri fideleco kun kiu ajn famkonata naci-lingva tradukaĵo, dank'al la nekomparebla fleksebleco de Esperanto postsekvi preskaŭ laŭvorte kaj laŭritme la anglajn versojn tamen ne difektante sian propran stilon: fleksebla, logika, klara kaj belsona en sia lingvo, L. N. M. Newell sciis plensperte gardi la mezuron, majstre manipuli sian moderan fidelisman metodon; kaj ĝuste tial, li donis samtempe al la simpla homo kaptivan legaĵon kaj al la komentariisto fidindan dokumenton por pristudo.

Sufiĉe riĉenhava enkonduko kaj bonaj klarigaj notoj de la tradukinto aldoniĝis al la tradukverko, tamen mi konsilas rimarkigi, ke en la nuntempo aliaj elstaraj ŝekspirologoj kaj ŝekspirscenistoj konsideras Hamleton nek kiel simplan venĝemulon, nek kiel tipon de homo filozofiema kaj neagema, male kiel pozitivan heroon enkarnigintan la sopiron de siatempaj homoj al la vero kaj la justeco, al sia liberiĝo el sub la malbona sociordo kun ĉiaj katenoj, malvirtoj kaj koruptaĵoj. Se Shakespeare faris sian heroon eksterordinare pensema, tio devenas el tio, ke la homoj de la Renesanco nur povis sin liberigi komencante per la memstara repensado pri ĉio sub la nova lumo de la racio. Tiu esenco donis al la bela dramo la grandan forton movi kaj ree movi centmilionojn da homkoroj tra la jar-

centoj. Aparte mi konsilas plian notadon pri la duoblaj sencoj aŭ subsencoj ofte ne tradukeblaj de tiu aŭ alia esprimo el la originalo.

Unuvorte, mi alte taksas ĉi imponan laboron de L. N. M. Newell kaj ankaŭ la elegantan eldonon de Stafeto.

Dao anh Kha (Hanojo)
(Tradukinto de Hamleto en la vjetnaman)

"Hamleto" estas unu el la plej multe tradukitaj verkoj de la monda literaturo: ekzemple, naŭfoje en la urduan, kaj nun la duan fojon en Esperanton. Kial tia malekonomio? Ĉar la rekreo en alia lingvo de teksto tiel densa je poezio, je figuroj, kiuj estas la sango de la poezio, kaj je plurobloj de signifo — ekde ĝeneralaj interpretoj de la dramo ĝis la kalemuroj de la tombofosistoj — estas tasko tiel superhoma, ke ĝi ne povas ne vekti la homan ambicion, kaj same certe trompas ĝin. Des pli, ke necesas samtempe imiti la striktan, sed sentede deklameblan versoformon. Por traduki grandan geniaĵon, nur pli granda genio estas adekvata.

En tia kazo la ĉefa afero estas produkti legeblan kaj aktoreblan tradukon, kiu redonu almenaŭ la esencajn trajtojn de la originalo. Tion sukcesis Zamenhof, kaj tion nun sukcesis ankaŭ Newell. La diferenco estas en tio, kion ĉiu klopodas konservi aŭ rezignas. Ambaŭ rezignis iagrade pri la denseco, kvankam Newell malpli ol Zamenhof. Kompanse, Newell donas al ni vorte fidelan tekston kiu riparas la plimulton el la zamenhofaj preterlasoj: eĉ ĝis la famaj floroj de Ofelio. Li donas al ni pli riĉan vortuzadon, kio ebligis eviti tiujn ofte elefantajn kunmetaĵojn de la zamenhofa teksto. Sed ĉion ĉi li pagis per pli ofta elizio kaj ia perdo de flueco. Se li tre bone babiligas Polonion esperante, oni tamen sentas ĉe kelkaj pli gravaj paroladoj ian prozecon aŭ maltrafecon. Jen kaj jen, la menso stumblas ĉe iu vorto eble tre proksima al la originalo, sed neĝusta en la kunteksto de la esperanta frazo.

"Neniu traduko estas definitiva", prave skribis s-ro Newell en sia enkonduko. Nek la naŭa urdua, nek ĉi tiu dua esperanta.

V. Sadler

Konciza geografio de Ĉinio, de JEN Judi. Eld. Ĉina E-Ligo, Pekino, 1964. 240 p. 18 x 13 cm. plus 12 foto-paĝoj kaj mapo. Prezo: 2,15 gld.*

Ĉi tiu verko estas valora kontribuaĵo al la geografia literaturo en Esperanto. Ĝi enhavas du partojn — "Ĝenerala Priskribo" (67 p.) kaj "Laŭprovinca Geografio" (167 p.). Krom bazajn geografiajn aspektojn ĝi ankaŭ prezentas aktualan informon pri la evoluo de la ĉina ekonomio kaj socio. Tial ĝi povus esti utila por lernejoj instruistoj.

En aldono pri la transskribo de geografiaj nomoj estas tabelo kiu kompare montras la tri alfabetojn Hanlingvan Fonetikan, Interna-

cian Fonetikan kaj Esperantan. Estas ankaŭ listo de ĉ. 40 neologismoj, ĉefe rilate al plan- toj. Dek kvin fotografaĵoj pliriĉigas la tekston, sed mankas sufiĉe da detalaj mapoj, kaj pro tio la leganto nepre devas utiligi propran maparon.

Rapida tralego rikoltis treege malmultajn erarojn, ĉu gramatikajn aŭ presajn. La formato estas alloga, la stilo klare flua. Entute libro rekomendinda ne nur por la fakulo, sed ankaŭ por la ĝenerala leganto, kiu havas intereson pri la lando kun la plej granda loĝantaro en la mondo.

R. H. Osborne (Britujo)

esperanto
aprilo 1965

Kaukazaj rakontoj, de M. J. LERMONTOV. El la rusa tr. S. STARITSKY. Eld. UEA, Rotterdam, 1964. 72 p. 21 × 15 cm. 5,— gld. (20 st.)*

Okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de Lermontov, la eldona fako de U.E.A. havis la bonan ideon eldoni kelkajn famajn liajn rakontojn en traduko de D. Staritsky. Sub la titolo *Kaukazaj rakontoj*, ni trovas en esperanta vesto la rakontojn *Bela* kaj *Tamanj*, kaj ni povas bedaŭri la foreston de *Princidino Meri* kaj *Fatalisto*, kiuj konsistigas la duan parton de la *Heroo de nia tempo*. Ni povas ankaŭ bedaŭri la forlason de la antaŭparolo, en kiu Lermontov difinas kaj pravigas la figuron de sia heroo, Peĉorin: "La heroo de nia tempo, estimataj sinjoroj miaj, estas ĝuste portreto, sed ne de ununura homo: ĝi estas portreto kunmetita el la malvirtoj de tuta nia generacio, en ilia plena disvolviĝo... se vi kredis la eblecon de ekzisto de ĉiuj tragikaj kaj romantikaj malbonfaruloj, kial do vi ne kredas la realecon de Peĉorin?"

Peĉorin estas efektive pli reala, ol la kutimaj romantikaj herooj, sed li ne estas tiel abomena, kiel opiniis la ŝokiĝemaj tiamaj kritikistoj. Juna rusa oficiro, enuanta en la ekzistanta socio, li serĉas rimedon al sia enuo en la danĝeroj de koloniisma milito, en vojaĝoj al foraj landoj, en amoj ĉiam lin disrevigantaj. Ĉu eksterordinare? Ne. Eksterordinara estas la rakontista talento de Lermontov, lia kapablo partoprenigi la leganton en la agado. En *Bela*, Peĉorin forrabas ĉerkesan princidinon. Unu celo: sin distri, forpeli la splenon per la amo de la bela kaj sovaĝa ĉerkesino. Ŝi ekamas lin. Tio finiĝos malbone, kaj Peĉorin kulpos pri la morto de la amatino kaj de ŝia patro kaj pri la malfeliĉo de pluraj aliaj personoj. Tamen li fariĝas malsimpatia al la leganto nur tiam, kiam li mistraktas — pro simpla solemo kaj apenaŭ kulpa orgojlo — la amikecon de sia iama

maljuna kaj simpatia kolego, Maksim Maksimiĉ. En *Tamanj*, li, "kiel ŝtono ĵetita en glatan fonton" maltrankviligas la kvietecon de "honestaj kontrabandistoj": simpla kaprico de la hazardo.

Legu, vi ne bedaŭros. Ne nur vi konatiĝos kun unu majstro de la rusa prozo, kiun vi jam konas kiel poeton (¹), sed vi forgesos nek la grandiozajn kaukazajn pejzaĝojn, nek la heroon de ne tiel malproksima tempo, nek la bonan Maksim Maksimiĉ, nek la sorĉajn figurojn de la fiera kaj amema Bela kaj de la alloga sed murdopreta knabino de Tamanj.

La traduko estas vigla, flua kaj fidela. Enestas kelkaj mallertaĵoj: "ĝi estis ĝi", sistema uzo de *malgraŭ ke*, tie, kie *kvankam* plej ofte sufiĉus, vortoj kiel *poŝtstacio* aŭ *poŝtĉevaloj*, malfacile elparoleblaj. Sed la tradukinto kulpis ankaŭ certan nombron da rusismoj, pri kiuj ne estas superflue atentigi la legantojn. Krom la zamenhofa *ne unu fojon* (pli ol unu fojo), ni renkontas: *alian tagon* (legu: *la morgaŭon*), "la rivero disludiĝis" (ĉu la leganto komprenos, ke ĝi senbridiĝis aŭ furiozis? Dubinde.), rigardi *en la fenestron* (male: *el ĝi*, aŭ pli simple: *tra ĝi*). "Mi estas ĉi tie nelonge" devas esti komprenata: *de nelonge*, kaj "mi gratulas vin kun la trovaĵo" signifas evidente: *pro* la trovaĵo. Tia frazo: "Mi... sin provizi per edzino pli frue ne konjektis" aldonas al lingva eraro (*sin* anstataŭ *min*) malklarecon pri la senco. Komprenu: "mi ne zorgis pli frue pri edziĝo".

Malgraŭ tiuj peketoj, mi rediras, ke la traduko estas laŭdinda. Plie, la eldoninto havis la bonan ideon aldoni ĉe la fino bibliografion de la verkoj de Lermontov ekzistantaj en esperantlingva traduko.

Michel Duc Goninaz (Francujo)

(¹) *Elektitaj versaĵoj* de Lermontov aperis en 1964 en Moskvo.

La konstitucio de la regno Japanio. Trad. Masuzo INOUE, Riej HASEGAWA. Eld. KLEG, Osaka, 1964. 19 p. 18 × 13 cm. 0,50 gld. (2 st).*

En la lasta tempo aperis en Esperanto multaj artikoloj kaj pluraj verkoj rilatantaj al Japanujo, el kiuj Enciklopedieto Japano okupas elstaran lokon. Ili certe kontribuas al vastigo de la scioj pri tiu lando kaj ĝia popolo.

Tial estis tre bona ideo publikigi en Esperanta traduko ankaŭ la Konstitucion de Japanujo. Ĝi respegulas la politikajn atingojn de la Japano popolo en la postmilita periodo kaj donas klaran bildon pri la fundamentaj trajtoj de la nuntempa ŝtatorganizo de la lando.

Bedaŭrinde la traduko ne estas bona. En Esperanto jam ekzistas relative abunda literaturo rilatanta al interna kaj internacia juro. Rezulte, formiĝis aro da precizaj terminoj por difinitaj juraj konceptoj. La tradukintoj evidente malatentis tion. Ili arbitre kaj plej ofte

ne tre sukcese, eĉ neegale kaj konsekvence en diversaj artikoloj, uzis aliajn terminojn. Tial oni devas plurloke iom cerbumi por kompreni la veran senco de la teksto. Kion, ekzemple, signifas "dece" elektitaj en la unua linio? Ĉu la deputitoj povas esti "maldece" elektitaj? Temas sendube pri "laŭregule" elektitaj reprezentantoj de la popolo. Kial uzi la terminon "superregeco", se en Esperanto por tiu koncepto ekzistas la vorto "suvereneco"? Estas eraro uzi la vortojn "popolano" anstataŭ "civitano", "ratifiki" anstataŭ "ratifi", "nommontro" anstataŭ "propono" aŭ "propono laŭnome" ktp. En la art. 22 — "Libereco forlasi... sian popolanecon estu netuŝebla" — temas evidente pri la "rajto rezigni pri sia ŝtataneco". En la art. 37 anstataŭ "malfermita juĝado" devus esti "publika juĝado". En la traduko troviĝas ankaŭ multaj stilaj kaj gramatikaj eraroj.

I. L.

Kiel esti amata, rakonto de Kazimierz BRANDYS. El la pola tr. Jerzy GRUM. Eld. PEA, Varsovio, 1964. 65 p. 20 x 12 cm., ilustrita. 1,50 gld (6 st).*

Dum flugvojaĝo de Varsovio al Parizo, virino monologas al si siajn pensojn: grade oni malkovras, ke, iama aktorino, ŝi nun prezentas skeĉojn en la radio; ankaŭ, ke ŝi dum la germana okupado helpis persekutaton rifuĝi en ŝian hejmon (kie ŝi dum kvin jaroj kaŝos lin). Sed ekde la momento, kiam la leganto ekscias pri la dumviva vivo, ambaŭ rilatoj: la nuna, profesia, kaj la iama okazaĵo — kiu turniĝos al dramo — miksiĝas kun la ĉeestado en la flugmaŝino kaj konversacio kun la eleganta, fremda najbaro. Ĝiaj malvolviĝantaj pensoj tiel implikiĝas, ke estas tre malfacile, ĝis duono de la legado, scii, en kiu momento de ŝia vivo oni nun troviĝas, ĉu "li" estas la rifuĝinto, la "edzo" de la ĉiusemajna radioskeĉo, aŭ la afabla apudsidanto; ĉu "ili" estas la germanoj, la juĝistoj kiuj kondamnis ŝin, aŭ la homoj de la radio. Diskurado de la pensado, jes, sed eĉ la interpunkcio ne multe helpas por orientiĝi en tiu vagada fluo. El

tiu... nek romano, nek novelo, nek konstruita rakonto... el tiu, jes, scenaro, estis eltirita, kompreneble, filmo, kiu ricevis premiojn en San Francisko. Oni nun ofte diras, parolante pri la novskolaj filmoj, ke ili estas faritaj per kamerskribilo; oni povus diri, ke tiu "rakonto" estas skribita per skribkamero, kio ja ne faciligas la legadon.

Al tiu ĝeno ne malmulte kontribuas la traduko. Ĝi kompreneble provas imiti la koncizecon de la originala lingvo, sed ne ĉiam sukcese: troviĝas multaj elipsoj ofte dubesencaj, kelkfoje gramatike pekaj (pekaj ankaŭ kontraŭ la vortaro). Krome, kelkaj tro laŭliteraj tradukoj de polaj esprimoj. Kaj kion diri pri la abunda enmeto de senbezonaĵoj neologismoj? Mi ne estas absoluta malamiko de neologismoj, se necesaj... Sed tiu punkto neprigus multe pli da spaco, ol estas al mi permesita! Kaj tiuj monstroj: ausweiso, volksdeutsch, reiseiebero (germanaj vortoj kun - o!).

Tre resume: verko meritanta intereson, sed ne tute kontentiga.

Roger Bernard (Francujo)

La libro de la medianoj, de Allan KARDEC, el la franca tr. L. C. Porto Carreiro NETO kaj Ismael Gomes BRAGA. Eld. Brazila Spiritisma Fed., Rio de Janeiro 1964. 430 p. 18 x 14 cm. 10,— gld. (40 st).*

Al homoj volantaj ekkoni la spiritismon mi rekomendas antaŭe legi "La libro de la spiritoj", de kiu tiu libro estas daŭrigo. Ĉi tiu libro pritraktas ĉefe la manifestiĝon de la spiritoj.

Komunikiĝi kun la spiritoj oni povas nur helpe de mediano. La spiritoj havas liberan volon, kiel la homoj. Tial ilin la medianoj povas nur voki, neniam devigi veni.

Ĉiu societo spiritista nature altiras spiritojn similajn al ili mem. Nur al homoj serioze strebantaj al morala perfektigo povas veni superaj spiritoj por instrui ilin pri moralo kaj metafiziko. Spiritistoj instigitaj nur de sciivolo, distremo kaj materia profitamo allogas spiritojn same frivolaĵojn kiel ili mem. Se ili estas trompataj en la komunikoj ricevataj de la spiritoj, ili ricevas nur la justan punon.

La traduko estas tre malbona. Kelkaj eraroj, ekz. la uzado de demonstrativo anstataŭ la artikolo, estas preskaŭ sistemaj.

D-ro W. A. Verloren van Themaat (Amsterdam)

Pri kontraŭdiro, de MAŬ Zedong. Eld. Ĉina E-Ligo, Pekino, 1964. 59 p., 18 x 13 cm., kun frontispico. Bd. 0,95 gld. Br. 0,55 gld.*

Resumo: La nuna eldono estas laŭ reviziita teksto de lekcio verkita en 1937. Ĝi celas ekspliki la principojn de materiisma dialektiko, laŭ kiu kontraŭaĵoj (ekz. sociaj klasoj) povas transformiĝi unu en la alian.

Gramofondisko: kantoj de BARTÓK, LISZT, MENIL ("La Espero"), marŝo de BERLIOZ. Eld. Qualiton, Budapeŝto, 1962. Diam. 17 cm., 45 t.m. Prezo: 6,— gld. (24 st).*

Malofte oni havas okazon: recenzi vere bonegan diskon en Esperanto. Je unu flanko vira ĥoro kantas 'La Espero'. La orkestra fono estas vere bonega. La kantado estas bona kaj la prononcado preskaŭ perfekta, mi notis nur la iom tro 'i'-ecan sonon anstataŭ 'e' en 'espero'.

Due infana ĥoro vere ĉarme kaj majstre kantas 'Lude, petole gajas la kor', kaj kiel ĝi gajas!

Trie, la infana ĥoro montras sin sperta de vere profesia vidpunkto kaj kantas 'Fraŭlmokado'; la rapideco estas tia ke oni vere ne povas kapti ĉiujn vortojn, sed tio ŝajne ne multe gravas, ĉar la kanto estas tiom eksterordinara de harmonia vidpunkto. Oni malofte havas okazon aŭdi infanojn tiel bele kanti.

Je la dua flanko de la disko, estas pure orkestra muzikpeco. La MÁV-Simfoniorkestro ludas la Rákóczi-Marŝon de Berlioz kaj jen denove mi povas laŭdi.

P. K. Groves (Londono)

Godelieve, la nobelino de Gistelo, de F. R. BOSCHVOGEL. El la flandra tr. A. DECORTE kaj L. DE RUYVER. Eld. Fratoj de l'Karitato, Belgujo, 1960. 35 p. 21 x 14 cm. Biografia rakonto. 0,75 gld. (3 st).*

Resumo: Ĉi tiu bone presita kajero rakontas la vivon de flandra sanktulino, kiun murdis ŝia edzo en la jaro 1070. Post ŝia morto la loko — Gistelo — iĝis pilgrimejo.

La pafio, novelo de A. S. PUŠKIN. El la rusa tr. A. FIŠER. Eld. Eŭropa E-Konferenco, Wien XV, Fünfhausgasse 16, Aŭstrujo. Tria eld. 1965. 22 p. 14 x 10 cm., fotopresita. Prezo : 3 aŭstraj ŝilingoj.

Esperanto for Tasmanian Schools (por tasmanianaj lernejoj). 14 p. 21 x 14 cm. Anglalingva broŝuro.

Ĉinaj metiartaĵoj. Eld. Ĉina E-Ligo, Pekino, 1964. Serio de 12 kolorfotaj poŝtkartoj en koverto.

Pentraĵoj de KI Bajŝi. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1964. Serio de 12 kolorfotaj poŝtkartoj en koverto.

Nia korpo, anatomio kaj fiziologio de la homo por laikoj, de Seiho NISHI. Eld. Gunma-Esperanto-Societo, Japanujo, 1964. Dua eldono reviziita. 105 p. 21 x 15 cm., il. 7,20 gld.*

Kantante tra Pollando. Kantaro de Roman DOBRZYŃSKI kaj Tadeusz JARZECKI. Eld. PEA, Varsovio, 1964. 55 p. 17 x 12 cm. Kun muziknotoj. 1,50 gld. (6 st).*

De Ystad al Kiruna kaj reen, rememoroj el esperanta prelegvojaĝo, de Josef VITEK. Eld. G. Hendriksson, Malmö, 1964. 20 p. 21 x 18 cm., fotopresita. 2,10 gld. (8,4 st).*

Por la paco, vol. II. Eld. Unio de Sovetaj Societoj de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Alilandoj, Moskvo, 1964. 28 p. 21 x 14 cm., fotopresita. Artikoloj, poezio, k.a. 0,25 gld.*

Vichy. Eld. Syndicat d'initiative, 19 rue du Parc, Vichy, Francujo. Senpaga kolora turisma prospekto.

Provinco Lieĝo. Eld. Turisma Federacio de la Lieĝa Provinco, 33 Avenue Blondin, Liège, Belgujo. Senpaga turisma prospekto.

Poŝtstampa katalogo. (Pri esperanto-stampoj). Eld. EKIĤ, Malmö, 1965. 28 p. 30 x 21 cm., multobligita.

Tre zorge kompilita listo de urboj, datoj, okazoj, ktp., je kiuj estis uzitaj poŝtaj stampoj pri aŭ en Esperanto. En la fino troviĝas prezisto laŭ dolaroj.

Kiamaniere disvastigi Esperanton, de Anton H. TANNER. Eld. la aŭtoro, Munkeno, 1964. 73 p. kun aldonadoj, nebind. en kartona koverto. 6,50 gld. (26 st).*

Malto, la historia insulo, de Carmel MALLIA. Eld. la aŭtoro, 89, Old. Governor's Palace St., Vittoriosa, Malto, 1964. 15 p. 16 x 20 cm., mult. Prezo : 3 steloj ink. afrankon.

Nancy. Eld. Turisma servo, 57 strato St-Jean, Nancy, Francujo. Senpaga prospekto.

Lando ĉirkaŭ Vieno : Malsupra Aŭstrio. Eld. Landesfremdenverkehrsamt Niederösterreich, Wien I, Heidenschuss 2. Kolorpresita prospekto kun mapo kaj aldonitaj klarigoj en Eo.

TANKAE

DE L'FORPASINTOJ
LA TRAVIDEBLA OMBRO
NIN ĈIRKAŬDANCAS
GVATANTE NIAN VENON
AL TIES NEPRA NOMBRO

PAUL LOBUT

* Ricevebla ĉe UEA

Kunsidas la Armena E-Komisiono (vidu p. 75, Sovetunio)



LAŬLANDE

Belgujo

● En la nacia biblioteko de la Nacia Societo de la Belgaj Fervojoj estas inaŭgurota E-fako. Librojn donace petas Belga E-Fervojista Asocio, Centra Stacio, Bruselo 1, kaj kompenso per esperanta historio pri belgaj fervojoj.

Germanujo

● La ĉijara Germana E-Kongreso (5-7 junio) inkluzivos rondflugon super Düsseldorf, ekskurson en montara regiono, kaj du diservojn. Informadreso: 4 Düsseldorf 1, Herzogstr. 79.

Hungarujo

● Dum la pasintaj kvin jaroj elĉerpiĝis kvar eldonoj de la lernolibro de Julio Baghy — entute 24.000 ekzempleroj. Same la lernejan lernolibron de I. Szerdahelyi necesis ripete eldoni.

● Pro la venonta Universala Kongreso en Budapeŝto en 1966, multaj hungaroj deziras korespondi. Adresojn peras E-Grupo "Konkordo", Budapeŝto II, Keleti Károly-u. 22.

Israelo

● Al la ĉiam pli multaj geedziĝoj pere de la Internacia Lingvo aldoniĝas tiu de mag. Nisim Israeli, kasisto de Esperanto-Ligo en Israelo, kun d-rino Lidja Byjos el Pollando.

Japanujo

● La Konstanta Kongresa Sekretario, s-ro G. G. Pompilio, inter la 22-a de februaro kaj la 11-a de marto travojaĝis 14 japanajn urbojn por diskonigi la 50-an Universalan Kongreson en Tokio.

Malto

● Malta Esperanto-Societo (89 Old Governor's Palace St., Vittoriosa) komencis aperi sian multobligitan bultenon "Esperanto" ekde januaro 1965. La insulo fariĝis sendependa de Britujo en 1964. Rezulte de ĵurnalartikoloj, komenciĝis koresponda kurso de Esperanto.

Mongolujo

● Post la jam aperinta (3000 ekz.) lernolibro de Esperanto por mongoloj, baldaŭ sekvos E-mongola kaj mongola-esperanta vortaro. Interesiĝo kreskas precipe inter la junularo. La Mongola Popola Respubliko havas iom pli ol unu miliono da loĝantoj.

Norvegujo

● Inter la ekskursoj planitaj por la Nordlanda Kongreso (Oslo 19-22 junio) estas vizito al la parko de Vigeland, kun 150 grupoj da skulptaĵoj, boatveturo sur la fjordo, vizito al la Muzeo Kon-Tiki, ktp. Aliĝintoj povos elekti inter 3 postkongresaj ekskursoj.

Pollando

● La organizaĵo de polaj vojaĝoficejoj planas pli vastan aplikon de la Internacia Lingvo por sia eksterlanda agado, kaj tiucele invitis esperantistojn aliĝi al ĝiaj kursoj por turismaj gvidistoj en eksterlandaj ekskursoj.

Sovetunio

● La Armena Societo por Amikeco kaj Kulturaj Kontaktoj kun Eksterlando ĵus fondis Esperanto-komisionon por disvastigi kulturajn k.a. informojn pri Armenio per la Internacia Lingvo. Prezidanto estas akademiano prof. Gurgen Sevak. Adreso: AOKS, Esperanto-Komisiono, Str. Abovjan n-ro 3, Erevan, Armenio. (Vidu la foton)

● La granda rus-esperanta vortaro redaktita de prof. E. Bokarev aperos, laŭ oficiala anonco, en la fina kvarono de 1965. La esperanta-rusa vortaro sekvos en 1966. Ĝi estos la plej ampleksa de tiu speco iam eldonita.

Unuiĝintaj Nacioj

● Deko da oficistoj de la Sekretariato partoprenas E-kurson sub gvido de s-ro Mark Starr.

LAŬFAKE

Leksikografio

● Jam rapide progresas la preparado de la esperanta eldono de la bildvortaro Duden (vidu "Esp." 1964, p. 13). En la nuna momento la verko estas eldonata en presprovaĵa formo por finaj kontroloj. Personoj kun fakaj scioj, kiuj estas pretaj kritike kontroli difinitajn sekciojn, povas senpage ricevi tiujn presprovaĵojn, per peto al Esperanto-Press, Cardiff (Ont.), Kanado. Aliaj povas aboni la proveladon je la sama adreso per pago de 50 steloj.

Medicino

● La Eskulapida Klubo — Esperanto-Klubo en la medicina fakultato de Tokia Universitato — pravas sian reviviĝon per eldono de bele multobligita 34-paĝa revuo kun artikoloj interesaj por medicinistoj kaj studentoj. Adreso: ĉe prof. H. Hosokaŭa, Anatomia Inst., Medicina Fakultato, Tokia Universitato, Tokio.

Ornitologio

● Kiel en antaŭaj jaroj, s-ro Wim de Smet, Drogenberg 36, Overijse, Belgujo, daŭrigas sian esploron pri la migrado de kukoloj. Li petas informojn el ĉiuj eŭropaj landoj pri (a) nomo kaj situo de la observo-loko, (b) dato de la alveno de la unuaj kukoloj, (c) aspekto de la regiono, (ĉ) veterkondiĉoj lastatempaj, (d) nomo kaj adreso.


Rotario

● En 1967 okazos en Nice, Francujo, Kongreso de Rotario Internacia. Por ĝia organizo estas uzata ankaŭ Esperanto. La E-fako de la Rotaria Klubo de Nice (Hôtel d'Angleterre, Ave. Gustave V) alvokas ĉiujn rotarianojn peti esperantlingve informojn pri la Kongreso kaj, se iel eble, jam plani sian partoprenon.

Turismo

● Nederlanda eldonejo preparas 25-lingvan turisman vortareton, en kiu la originala (1500-era) teksto estas la esperanta, dum ĉiuj aliaj estos tradukitaj el la esperanta.

mallongaj novaĵoj



LA JUNA VIVO

**Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando.**

KONGRESO, KONFERENCO, SEMINARIO, TENDARO.... FERIO!

La **dua oficiala informilo** anoncas la programon de la 21-a IJK, de 8 ĝis 15 aŭg. Ni citas: Oficiala akcepto de guberniestraro kaj urbestraro, oratora konkurso, du tuttagaj ekskursoj, sunĝuado en kaj ekster la urbo Ootū, aŭ en kaj sur la lago Biwa.

Belarta vespero kun japana muziko, teatraĵo de la "Trupo Nubo", dancoj kaj kantoj. Konkursoj de japana belskriba kaj paperfaldartaĵoj. Gaja renkonto kun loka junularo, kunarangita de la Junulara Ĉambro de Komerco en Ootū. Sporto, kaj kampadeja fajro.

Ne forgesu kunpreni: naĝkostumon, popol-kostumon, donacaĵon kun mesaĝeto, muzik-instrumenton kaj kontribuojn por la Belarta Vespero. Kotizoj: 63 gld (ĝis 20-j.) aŭ 70 gld. (20-j. kaj pli).

Petu aliĝilon kaj informilojn ĉe: 21-a IJK, Kansai Esperanto-Renmei, 3-10 Nakatu-Hamadori, Ooyodo-ku, **Osaka**, aŭ ĉe via landa TEJO-sekcio.

"Realigu revo via, per kongreso japania!"

☆

Nia dua ĉefurbo por rendevuo, post Ootū, ĉi-somere estas Amsterdam. Ni memorigas ke la valora Konferenco Anne Frank pri "Komunikado", kaptos viajn atenton kaj kontenton, de 25-31 julio. Ĝin plene aprobas, apogas kaj rekomendas TEJO. Informojn petu al: Domo Anne Frank, Prinsengracht 263, Amsterdam-C.

Al **Primorsko** invitas vin la Bulgara Esperanto-Junularo, de 20 ĝis 31 julio. En la tiea **Internacia Seminario** prelegos eminentaj Bulgaraĵ esperantistoj, enkadre de la Jaro de Int. Kunl. Alterne oni ĝuos varman sunon kaj nigran maron dum la liberaj horoj. Kotizoj potagaĵ: 3,50 dol. (por bangalo) aŭ 2,50 dol. (por tendo). Vizo estas senformalaje ricevebla ĉe ĉiu bulgara konsulejo. Aliĝu ĉe: Bulgara Esperanto-Junularo, p.k. 587, Sofia.

☆

"**Muelejo de metilernantoj**" estas feria centro por miloj da labor-volontuloj, kiuj kune, en amika kunrestado en la koro de Francujo, ĉiujare (re)konstruas muelejojn kaj pavilonojn. En la "Esperanto-pavilono" oni instalas malgrandan internacian muzeon.

Okaze de Pasko oni nun ekarangos Esperanto-kurson, por ke la amikecan etoson de la helpantoj ne ĝenu lingva baro. Je tiu okazo

La Esperanto-pavilono

ĉiuj eksterlandaj gejunuloj bonvolu skribi al la lernantoj, por ke ili tuj rimarku la ligon kun gejunuloj ĉiulandaj. Plie, se vi deziras persone sperti la tieajn naturon kaj laboron, vi estas bonvena por partopreni en la komuna plezuro kaj konstruado de la estonta Esperanta vilaĝo.

Anoncu vin al s-ro Chareille, Bonnat (Creuse), Francujo.

☆

"**Japanujo**" estas la temo de la 10-a Int. Junulara Kunveno de GEJ, kiu okazos (lige kun la 43-a Germ. Esp. Kongr.) en Düsseldorf, de 5 ĝis 12 junio. D-ro Keniti Kozima kaj s-ro Seiichi Tada (memoru el la 20-a IJK!) prelegos pri Japanujo kaj prezentos filmojn kaj lum-bildojn. Vizitontoj de la IJK: ĉi-pere preparu vian ferion! Ne-vizitontoj: ĉi-pere riparu vian ferion!

Kotizo: 65 GM (ĝis 25-j.) aŭ 75 GM (pli aĝaj). Antaŭpagon de 6 GM (el 65 GM) aŭ 12 GM (el 75 GM) ĝiru al pĉkk Essen 167673, indikante sur la slipo "por 10-a IJK de GEJ". Samtempe aliĝu ĉe adreso: 43-a Germ. Esp. Kongr., Herzogstr. 79, 4-Düsseldorf-1.

Informojn petu al U. Lins, Gemarkenstr. 146, 5-Köln-Dellbrück.

☆

Dimanĉe, 9.V.65, okazos Esp.-tago en la kadro de la internacia komerca foiro de **Lille**. Junulargastejo proksima al la foiro. Eksterlandanoj bonvenaj! Informoj: Esperanto, 26 rue des Martyrs de la Résistance, **Lambersart** (Nord), Francujo. El la tagordo: prezento de la filmo "Angoroj", kaj oficiala akcepto.

Ankaŭ en la foiro de **Parizo** junaj esp'istoj aktivos. Ili deĵoros ĉe la budo, kiun UFE aranĝos (19-31 majo).

☆

Dum filatela elsendo de l' franca televido oni prezentis portreton de d-ro L. Zamenhof faritan el poŝtmarkoj. La samo okazis en la nederlanda televido: la kolekton de esp. poŝtmarkoj de s-ro Bakels oni larĝe komentis kaj montris.

☆

La E-rondo de Tourcoing prezentis tri panelojn pri la lingvo internacia ĉe ekspozicio okazinta ĉe la nova junulardomo **Orions**.

☆

Skolta grupo el Brugge (Bruĝo) ĉeestis tri-landan renkontiĝon en la franca urbo Caudry. Venontaj rendevuoj en Lille (25.IV) kaj Ostendo (6.VI).

☆

La Studenta Scienca Rondo de Esperantistoj ĉe Universitato "Kopernik" en Torun (Pollando) okazigis de 4 ĝis 6 januaro 1965 internacian seminarion. La programo, sub aŭspicio de la rektoro, enhavis klerigajn, allogajn prelegojn, diskutojn kaj ekskursojn.

(daŭrigo dekstre)



Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo. En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Por aliaj horsistemoj vidu "Esperanto" 1963, p. 117 (junio). Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.



Ĉiutage	15.30-16.00	Warszawa, 200m. (1502 kcs), 50.42m. (5950 kcs), 48.90m. (6135 kcs), 42.11m. (7125 kcs), 41.99m. (7145 kcs), 41.18m. (7285 kcs), 31.45m. (9540 kcs), 31.01m. (9675 kcs). P. Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Warszawa, Pollando.
Dimanĉo	19.00-19.25 23.30-23.55	Sofia, 48.62m. (6170 kcs), 39.11m. (7670 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo. Sofia, 48.62m. (6170 kcs), 41.35m. (7255 kcs). P.
Lundo	00.15-00.45 6.15- 6.30 22.40-22.55 22.45-23.00	Muritiba, 216m. (1390 kcs), I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.. Gdansk, 230m. (1304 kcs), I. Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdansk, Hilversum, 298m. (1007 kcs) aŭ 402m. (746kcs). P., N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato). Valencia, 278m. (1078 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
Mardo	14.45-15.00 16.50-17.00 17.55-18.10	Valladolid, 203m. (1475 kcs), K.I. Radio Valladolid, Hispanujo. Wien, 577m. (520 kcs). 514m. (584 kcs). 293m. (1025 kcs). 25.45m. (11785). P. Radio Wien Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo. Roma, 50.34m. (5960 kcs), 41.24m. (7230 kcs), 31.33m. (9570 kcs). P. Radio Roma, Esperanto Fako, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
Merkredo	17.45-18.00 17.55-18.10 18.45-19.00 23.30-23.55	Rio de Janeiro, 375m. (800 kcs), 50.08m. (5990 kcs), 30.71m. (9770 kcs), 25.10m. (11.950 kcs), 16.78m. (17.880 kcs). K. I. Rádio Ministério da Educação, Praça da República 141-A, Rio de Janeiro, Brazilo. Roma. Kiel marde. Resende, 1961m. (153 kcs). P. Radio Agulhas Negras ZYP 22, Praça Oliveira Botelho, Resende (Rio de Janeiro), Brazilo. Bilbao, 264 m. (1133 kcs). I. P. Radio Bilbao, Apartado 1117, Bilbao, Hispanujo.
Ĵaŭdo	17.50-18.00 20.30-20.45 23.05-23.20 23.05-23.20	Praha, 233m. (1286 kcs). I. Radio Praha, Disaŭdigoj por Aŭstrujo, Praha, Ĉeĥoslovakujo (nur la lastan ĵaŭdon de la monato). Volta Redonda, 1560m. (192 kcs). P. Radio Siderurgica Nacional ZYP 26, Volta Redonda (Rio de Janeiro), Brazilo. Zagreb, 264m. (1135 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo. Beograd, 439m. (683 kcs), 48.78m. (6150 kcs). P. (programo de Radio Zagreb).
Vendredo	17.55-18.10 20.00-20.30 22.45-22.55	Roma. Kiel marde. Pekino, 51.00m. (5880 kcs), 40.40m. (7440 kcs), 30.10m. (9955 kcs). I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo. Hilversum, 298m. (1007 kcs) aŭ 402m. (746 kcs), P., V.A.R.A., Poŝtkesto 175, Hilversum, Nederlando.
Sabato	9.45-10.00 11.30-12.00 16.00-16.30 19.00-19.15 20.00-20.30 22.00-22.30	Rio de Janeiro, 214m. (1400 kcs). K. Radio Roquete Pinto Av. Almirante Barosso 81, Rio de Janeiro, Brazilo. Niteroi, 240m. (1250 kcs), I.K. Radiodifusora Fluminense, Niteroi (Rio de Janeiro), Brazilo. Guatemala, 220m. (1360 kcs), 48.54m. (6180 kcs), 30.75m. (9760 kcs). I.K. Radio Nacional TGW, Guatemala Cd., Mezameriko. Teresina, 259m. (1160 kcs), 62.56m. (4795 kcs). P. Radio Pioneira de Teresina, Rua Teodoro Pacheco 1179, Teresina, (Piauí). Brazilo. Pekino. Kiel vendrede. Uberlândia 191m. (1570 kcs), I.K. Rádio Cultura de Uberlândia, Minas Gerais, Brazilo.

RADIO ROMA. Vidu detalan programon en la marta numero.

(daŭrigo de maldekstre)

Internacia kultura semajno por studentoj kaj novaj lernantoj okazos de 9 ĝis 17 aprilo 1965 en la kastelo Grésillon, Baugé.

☆

"Nord Eclair", Franca ĵurnalo, publikigas ĉiusemajne rubrikon pri Esperanto, kaj ĉiutage rubrikon por junularo. Respondekas: Esperanto, 7 Rue Saint Saëns, Wattrelos (Nord).

JOSEP CASANOVAS GENOVER (1884-1965)

La 26-an de januaro en la kataluna urbo Girona forpasis pastro J. Casanovas Genover, teologia doktoro. Li estis prezidanto de la "Internaciaj Floraj Ludoj" (belartaj konkursoj).

BEN ALTER

Ni plej kore kondolencas al s-ro J. Ben Alter, komitatano de E-Ligo en Israelo kaj peranto de UEA, pro la morto de lia edzino.

nekrologoj

esperanto
aprilo 1965



50-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO Tokio, 31.VII - 7.VIII. 1965

Sub la Alta Protektado de D-ro Yuji Shibata,
Prezidanto de la Japana Akademio.

OFICIALA KOMUNIKO

Loĝado en Tokio.

La Kongresanoj, kiuj deziras rezervi hotelĉambron pere de la Loĝiga Servo, nepre uzu la koncernan mendilon en la Dua Bulteno. Sur la mendilo estu klare indikitaj la datoj de alveno al Tokio kaj de foriro. Tiuj personoj, kiuj post la Kongreso partoprenos aliajn manifestaciojn en Japanujo, bonvolu indiki ankaŭ la datojn de reveno al Tokio kaj de definitiva foriro. Se tiuj datoj ne estas indikitaj sur la mendilo, la Loĝiga Servo rezervas la hotelĉambron nur por la kongresa periodo (31.7 - 8.8).

Manifestacioj post la U.K.

De la 9-a ĝis la 13-a de aŭgusto okazos Postkongresa Ekskurso al Kioto kaj Nara. Detaloj troviĝas en la Dua Bulteno.

De la 13-a ĝis la 15-a de aŭgusto okazos en Kameoka (Kioto) "Oomoto-Internacia Festi-

valo". Detaloj en la Dua Bulteno.

De la 8-a ĝis la 15-a de aŭgusto okazos en Ootu la 21-a Internacia Junulara Kongreso. Detaloj en la Dua Bulteno.

De la 15-a ĝis la 17-a de aŭgusto okazos tritaga ekskurso al Gifu, Nagoja kaj Toba. La ekskurson rajtas partopreni maksimume 38 personoj. Detalajn informojn donas nur Tokai Esperanto-Ligo, 1-51 Tohata-tyo, Syowa-ku, Nagoya, Japanujo.

De la 13-a ĝis la 15-a de aŭgusto okazos ekskurso al Hiroŝima. Detalajn informojn donas nur Hiroŝima Esperanto-Societo, P.O. Box 24, Hiroshima-Nishi, Japanujo.

Postkongreso.

La partoprenantoj de la tuttaga ekskurso je la 8-a de aŭgusto, kiuj samtempe deziras partopreni la Postkongreson, forveturos karavane el Tokio la 9-an de aŭgusto en la mateno, ĝustatempe por partopreni la manifestaciojn de la Postkongreso.

Kotizoj de Postkongreso.

La partoprenantoj de la Postkongreso, kiuj revenos al Tokio je la 13-a de aŭgusto (tuj post la fino de la Postkongreso) devas pagi

oficiala informilo n-ro 378, 1. mar. 1965

NOVA ĈEFDELEGITO POR GERMANUJO

Ekde la 1-a de aprilo 1965 s-ro Reinhard Hauptenthal, 6603 SULZBACH/SAAR 1, Am Bahndamm 12, estos nova ĉefdelegito, kaj anstataŭos s-ron Günther Feis, kiu pro profesiaj devoj ne plu povos ofici. Al la ĝisnuna ĉefdelegito ni dankas pro la plenumitaj laboroj.

De nun ĉiuj pagoj, aliĝiloj, adresŝanĝoj ktp. estu direktataj al s-ro Hauptenthal. Lia poŝtĉeka konto estas: Saarbrücken 152 93.

DELEGITOJ

Vidu la aperontan Jarlibron 1965/I.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

De Cock, s-ro C., Halle, Belgujo.
Grant, s-ro S., Port Lincoln, Aŭstralio.
Grasso, s-ro Franco, Acireale, Italujo.
Laufen, s-ro Peter, Montréal, Kanado.
May, s-ro Wiley O., Los Angeles, Usono.
Moerbeek, s-ro J., Haarlem, Nederlando.
Moerbeek-Prins, s-ino A. E., Haarlem, Neder.
Peraire, s-ino F., Houeillès, Francujo.
Sadler, s-ino Goŭri, Derby, Britujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1965

178 Grahovac, s-ro Ilja, 179 Timmins, s-ro V. J., Aŭstralio; 180 Kestens, f-ino M., Belgujo; 181 Coutinho, s-ro A. Caetano; 182 Melo, s-ro Roskildes Per. de; 183 Pereira, s-ro Evaristo M.; 184 Pinto, s-ro José Dias; 185 Ribeiro, s-ro Djalma Prates; 186 Silva, s-ro Paulo Vieira da,

Brazilo; 187 Atkinson, s-ro G. B.; 188 Berry, f-ino E.; 189 Boatman, s-ro Douglas P.; 190 Cross, s-ino D.; 191 Eldon, s-ro H. B.; 192 Hockey, f-ino M. J.; 193 Ingham, s-ro H.; 194 Knight, s-ino E. B.; 195 Laurie, s-ro E.; 196 Laurie, s-ino W.; 197 Levy, s-ro D. S.; 198 Mee, s-ro L.; 199 Middlemast, s-ro Arthur H.; 200 Murray, s-ro R.; 201 Phelan, s-ro H. K.; 202 Pilling, s-ino F. K.; 203 Prince, s-ro A.; 204 Relf, s-ro E. F.; 205 Rogers, s-ro F. J.; 206 Ryan, s-ino Jane S.; 207 Seddon, s-ino R.; 208 Sly, s-ro Kenneth A.; 209 Squire, f-ino E.; 210 Withey, s-ro D. H., Britujo; 211 Jahn, s-ro C. J.; 212 Møller, s-ro Poul; 213 Rude, s-ro Victor, 214 Schröder, s-ro Ole, 215 Ziegler, s-ro Sv., Danlando; 216 Korkala, s-ro O.; 217 Oksala, s-ro Mauno, Finnlando; 218 Beau, s-ro Jean; 219 Bideau, s-ro A.; 220 Bodson, s-ro Claude; 221 Maillard, d-ro Gaston; 222 Marly, s-ro Pierre; 223 Trésorier, s-ino Jacqueline, Francujo; 224 Castelltort Riba, s-ro Josep; 225 Perarnau, s-ro Jaime; 226 Pérez Bárcena, s-ro Luis; 227 Solá, s-ro M.; 228 Tónico, s-ro Tomás, Hispanujo; 229 Lacalendola, prof. A.; 230 Minnaja, s-ro L., Italujo; 231 Majcenović, s-ro Mijo, Jugoslavio; 232 Archell, s-ro Reginald S., Kanado; 233 Armanis, s-ro Andrejs; 234 Ringstad, s-ro G., Norvegujo; 235 Dickson, s-ino Margaret E., Sudafriko; 236 Almén, s-ro P.; 237 Andreasson, s-ro Bertil; 238 Bengtsson, s-ro Karl; 239 Björklund, s-ro F.; 240 Fejde, f-ino Gunnel; 241 Fejde, s-ro M.; 242 Johansson, s-ro Erik; 243 Karlsson, s-ro K.G.; 244 Lidell, s-ro Ville; 245 Lindberg, s-ro Fritiof; 246 Lindberg, s-ro Torsten; 247 Ohlsson, f-ino Ester; 248 Olsson, s-ro Einar; 249 Olsson, s-ro Olle; 250 Persson, s-ro Olle; 251 Sedendahl,

220,— gld. La aliaj, kiuj ne revenos al Tokio je la menciita dato, devas pagi 200,— ned. gld. Por la unuaj estos rezervita sidloko en la trajno Kioto-Tokio; por la aliaj ne.

Statistiko (je 20.3.1965).

Alg. 1, Arg. 4, Aŭstral. 27, Aŭstruj. 8, Bah. In. 2, Belg. 7, Braz. 9, Brit. 43, Bulg. 11, C.A.R. 1, Ĉeĥ. 1, Danl. 19, Finn. 6, Fran. 87, Ganao 1, Germ. 41, Hind. 1, Hisp. 7, Hong-Kongo 2, Hung. 8, Irl. 1, Isr. 2, Ital. 30, Jap. 746, Jug. 10, Kameruno 2, Kanado 6, Maroko 2, Meks. 2, Monako 2, Ned. 32, Norv. 11, NovZ. 15, Poll. 29, Port. 1, Rum. 1, Sovetunio 1, Sved. 49, Svisl. 12, Urug. 4, U.A.R. 1, Usono 52, Venez. 3.

Entute el 42 landoj, 1300.

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario

AKADEMIO DE ESPERANTO

Korekto: Ni pardonpetas pro malklara esprimo en la marta "Esperanto", p. 59. Oni bonvolu kompreni, ke la antaŭa ĝenerala sekretario de la Akademio, d-ro Albault, kiu okupis tiun oficon plenrajte (do ne "provizore"), petis anstataŭigon kiel ĝenerala sekretario pro sia elekto kiel direktoro de la sekcio "Vort-trezoro". Aliaj ŝanĝoj estas la elektoj de s-roj Gregor kaj Auld kiel direktoroj de la sekcioj "Gramatiko" kaj "Literaturo", respektive.

s-ro W.; 252 Sjöberg, s-ro Helge; 253 Söderberg, s-ro K.; 254 Stenström, s-ro John; 255 Tell, s-ro Leander; 256 Tjäder, s-ro Bertil, Svedujo; 257 Jayet, f-ino E., Svisujo; 258 Correa, s-ro Alfonso; 259 Fox, s-ro J. S., Usono.

DONACO ĜENERALA KASO

Davies, s-ro H., Manchester, Brit.: 30,— gld.

POR VASTIGO DE LA AGADO (JARO DE INTERNACIA KUNLABORO, JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO)

Perarnau, s-ro Jaime 16,20, Puig, s-ro Liberto 1,80, Tagüena, s-ro José 4,80, Vilagran, s-ro M. 2,40, Hispanujo; Fischer, s-ro J. Th. 5,—, Termaat, f-ino F. P. 10,—, Nederlando.

Sumo entute ricevita: 16 094,88 gld.

Sumo elspezita: 15 832,99 gld.

Saldo pozitiva: 261,89 gld.

FONDAJO CANUTO

Niven, f-ino Isabella, Britujo: 1 MA, 1 MJ. Waldén, s-ino Klara, Svedujo: 3 MA.

Ĉiuj kontribuu por helpi la esperantistojn en landoj kun malforta valuto, omaĝe al la prezidinto de UEA prof. d-ro Giorgio Canuto.

FONDAJO DOMO

Gieseler, s-ro Walther, Germanujo: 50,— gld.

FONDAJO JUNULARA GAZETO

Mrin, s-ro Vicente, Hispanujo: 12,— gld.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

SIMBOLA ALIĜO AL TOKIO !

Multaj esperantistoj, kiuj kutimas sufiĉe regule vizitadi la Universalajn Kongresojn, kiuj ne havas okazon partopreni la 50-an en Tokio, sed tamen plenkore aprobas ke fine okazu U.K. en Azio, interesiĝas pri ĝi kaj volonte subtenas ĝin. Aliflanke, tiu ĉi Kongreso, memkompreneble, kaŭzas multajn eksterordinarajn elspezojn, tiel ke malgraŭ la kontentiga aliĝado ĝia financa situacio estas ege malforta. Tial, kaj por doni al nepartoprenantoj la eblecon tamen ligi sin al la Kongreso, kaj por helpi al la financoj de tiu ĉi unika Kongreso, starigita estas

SIMBOLA ALIĜO AL LA 50-A

Tiu, kiu aliĝas simbole, pagas 25.— gld. (100 stelojn), ricevos specialan kongresan karton kaj siatempe ricevos memorajon. Koncerne tion oni povas elekti: aŭ la Kongresan Libron, aŭ samvaloran artan japanajon. Aliĝante, oni tuj indiku kiun donacon oni elektas (en kunligo kun la presigota kvanto de la Kongresa Libro).

La kotizon de 25,— gld. aŭ egalvaloro oni sendu rekte al la Centra Oficejo de U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, Nederlando, p.ĉ.k. 378964, bankrilato R. Mees & Zoonen, aŭ al la konataj adresoj de ĉef-delegitoj kaj perantoj.

SIMBOLE ALIĜU AL LA 50-A !

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1965

Stato de la 28-a de februaro

oficiala informilo

Konkurso I

Lando	kvoto	poentoj	%
1. Finnlando	2365	2225	94,08
2. Svislando	1800	1515	84,17
3. Britujo	6053	4317	71,32
4. Usono	3827	2640	68,98
5. Nederlando	5140	3390	65,95
6. Belgujo	1770	1140	64,41
7. Francujo	7009	4384	62,55
8. Danlando	2704	1560	57,69
9. Brazilo	3411	1933	56,67
10. Hispanujo	2804	1540	54,92
11. Svedujo	6190	3270	52,83
12. Norvegujo	1490	645	43,29
13. Italujo	3932	1555	39,55
14. Jugoslavio	3295	1090	33,08
15. Japanujo	3745	1160	30,97
16. Germanujo	6551	825	12,59

Konkurso II

1. Aŭstrujo	1090	765	70,18
2. Kanado	702	485	69,09
3. Aŭstralio	1288	768	59,63
4. Nov-Zelando	1195	660	55,23
5. Islando	250	95	38,00
6. Israelo	405	150	37,04
7. Argentino	760	185	24,34
8. Sudafriko	250	50	20,00
9. Urugvajo	250	45	18,00
10. Portugalujo	380	20	5,26
11. Madagaskaro	250	10	4,00

(Vidu la regularon en "Esperanto" 1965, p. 38).

esperanto
aprilo 1965

LEGU!

antaŭ la vojaĝo al Vieno

"VIENAJ LEGENDOJ"-N

44 paĝoj 4 steloj

dum la veturado al Vieno

"DISTRA KOKTELO"-N

128 paĝoj 10 steloj

Mendojn akceptas la organiza komitato de
"Eŭropa Esperanto-Konferenco 1965", Wien,
XV. Fünfhausgasse 16, Aŭstrio.

NUN ACETEBLA!

kompleta kolekto de la revuo

MONDA KULTURO


de 1962 ĝis 1964, kune bindita en unu bele
vestita volumo, kun ora surpriso kaj detala
indekso laŭ temoj kaj aŭtoroj. Daŭre valora!

Nur 19,— gld.

76,— steloj

ANTAŬ LA 50-A UNIVERSALA KONGRESO
mendu ĉi tiun luksan gvidilon tra la japana
vivo!

400 nomoj aŭ terminoj, tola bindaĵo kun
kartona skatolo, riĉa ilustro. Prezo: 18 gld
(72 st) Sola vendraĵo ekster Japanujo:
U.E.A



ENCIKLOPEDIETO JAPANA

ANONCETOJ

Filatelistoj atentu! 36 glumarkojn, belafran-
kitan unutagkoverton kun esperantlingva poŝt-
stampo speciala por 5 respondkuponoj ĉe
Germana Esperanto-Kongreso Pentekoston
1965, D-4-Düsseldorf, Herzogstr. 79.

Por internacia Esperanto-ekspozicio junion
1965 ni bezonas esperantlingvajn prospektojn,
afiŝojn, fotojn ktp. Sendu kontraŭ rekompenco
al Germana Esperanto-Kongreso, D-4-Düssel-
dorf, Herzogstr. 79.

Deziras interŝanĝi diapozitivojn kun ĉiuj
landoj: S-ro Alejandro Fernández, Ciudad
Jardín, Villa Viany, Granada, Hispanujo.

Internacian kongresatmosferon vi ĝuos Pen-
tekoston 1965. Aliĝiloj haveblaj kaj por kvin
respondkuponoj: 36 glumarkoj, bele afrankita
unuatagkoverto kun esperantlingva poŝtstampo
ĉe Germana Esperanto-Kongreso, Düsseldorf,
Herzogstr. 79.

Jam cent kluboj en la mondo prelegas pri
Esperanto per diapozitivoj. Kaj vi? Sendos
informojn: Lentaigne, 3 av. de la Gaillarde,
Montpellier, Francujo; oni aldonu respond-
kuponon.

Ekspozicion "Esperanto kaj Turismo" orga-
nizas Turista Sekcio "Esperanto", P.K. 66,
Sofio, Bulgarujo. Inter la sendintoj de taŭgaj
materialoj por la ekspozicio oni lotumos 3
abonojn de "Ripozoj", "Bulgario" kaj "Bulgara
E-isto".

Se vi estas homo, kiu dezirus gardi siajn
sanstatojn, sentojn kaj bonan humoron, i.a. per
sana vivmaniero, mi estus tre feliĉa konatiĝi
kun vi. Estas 35-jara. S-ino Ellen Skouboe,
P. Fabersvej 11, Århus V., Danlando.

Mi deziras kontakti ĉiujn spirite serĉantajn
homojn de tuta la mondo. S-ro Manuel M.
Heidun, Ellemarksvej 12, Århus C., Danlando.

Alvoko al fotoamatoroj! Esperantista kaj
fotoamatora rondoj ĉe Klubo de maŝinistaro,
Wolkrova 22, Prostějov, Ĉeĥoslovakujo, inter-
ŝanĝas kun la tuta mondo amatorajn fotojn
por ekspozicio aranĝota en septembro 1965.
Temo: "La vivo ĉirkaŭ ni". Formato mini-
muma: 13 × 18 cm.

Düsseldorf, la plej moderna urbo de Okci-
dent-germanujo invitas vin al Germana Espe-
ranto-Kongreso, Herzogstr. 79, Pentekoston
1965. Esperantlingvajn urbprospektojn sendaŝ:
Werbe- und Verkehrsamt Düsseldorf, Ehren-
hof.

Geonkloj Esperantistaj helpas la infanojn
de nia movado per korespondado. Petu
detalojn. 3 Berwick Avenue, Urmston, Man-
chester, Britujo.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn,
ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por
lernejo) turnu vian al la Koresponda Servo de
UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins,
Clermont-Fd. (Pdĉ) Francujo, kiu peras adre-
sojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Transirante Usonon — al Tokio
**LA ESPERANTO LIGO POR
NORD-AMERIKO**

invitas vin al sia
13-A NACIA KONGRESO
22-25 Julio, 1965
en
Portland — "Urbo de Rozoj"
Oregon — "La Kastoro-Ŝtato"
USONO

Inter belaj montoj kaj la Pacifika Oceano
L.K.K. Kongres-Centro
6011 S.E. Gladstone St.
Portland, Oregon 97206
U.S.A.

Partoprenu la
FOTO-KONKURSON 1965

en la kadro de la
50-a Universala Kongreso en Tokio

Valoraj premioj! Limdato: 1 julio 1965!
Legu sur p. 55 de la marta "Esperanto".

EL LA VIVO DE
LUDOVIKO ZAMENHOF

de Gösta Henriksson

Legolibreto por novaj esperantistoj
pri la junaĝaj jaroj de Zamenhof.
La konciza prezentado kaj simpla
lingvo donas eblecon trastudi la
libreton dum parto de studsezono
kaj doni al la lernantoj la personan
fonon de la ekesto de la lingvo
Esperanto.

Prezo: gld 2,—
Mendu ĉe UEA aŭ via kutima
libroservo.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

TOKIO-FLUGO de U.E.A.

Pro nuligo de kelkaj partoprenoj kaŭze
de malsanoj ktp liberiĝis kelkaj lokoj
en la aviadilo de U.E.A. Interesitoj tuj
skribu al la Centra Oficejo. Prezo:
Amsterdam-Tokio-Amsterdam:
2250,- gld (9000 steloj). Forveturo:
26.7.65, reveno 19.8.65. Unuaklasa
servo. Aviadilo: DC 7.

Helsingör

La 18.-25. de julio okazos la internaciaj feriaj
Esp-kursoj (1. perfektiga, 2. konversacia -
kaj 3. prepara kurso por naturmetodaj in-
struontoj) en La internacia Altlernejo en
Helsingör (Danlando), belega loko en parko
kaj ĉe banstrando. Ĉiuj kore bonvenaj. Sen-
paga prospekto havebla ĉe

L. Friis, Ingemannsvej 9,
Aabyhøj, Danlando

**ESPERANTISTA KAMPADEJO
PRIMOŠTEN**

ĉe la bordo de
Adriatiko
invitas vin.

Venu
vi ĝuos
lazuran maron
mediteranean klimaton
esperantistan etoson
unikan turistan observatorion.

Loĝebleco
sub tendo
en privataj domoj
en vilaostilaj hoteletoj.

Prezoj nealtaj. Kompleta pensiono kostas de
2 ĝis 4 kaj duono da usonaj dolaroj por ĉiu
tago kaj persono, depende de la sezono kaj
elektita loĝloko.

Esperantistoj ĝuas rabaton.

Ĉiujn informojn donas:

Internacia Esperanto-kampadejo **PRIMOŠTEN**
ĉe Šibenik

Jugoslavio

Por mi la nomo signifas Kvalito !


PASINTAN KRISTNASKON MIA EDZINO donacis al mi **PHILISHAVE** (kia bonŝanco!). Onidire mi jam aŭdis ke ĝi estas bona razilo, sed nun mi scias propraspekte ke ĝi elstaras: efika, fidinda kaj... ĝi plene valoras sian prezon.



DEZIRANTE RECIPROKI, mi decidis regale surprizi mian edzinon per fridujo de Philips. Kiom ravita ŝi estis, kaj nun ŝi demandas sin kiel ŝi povis vivi sen ĝi. Ke mia biero restas malvarmeta, ĝuste je mia preferata temperaturo, estas nur pure koincida krom-rezulto.



LA PHILIPS-EMBLEMO ne estas nova por mi - En mia laborejo ĝi aperas sur ĉiaspecaj super-progresaj elektronaj ekipaĵoj. Mia kompanio utiligas nukleo-instrumentojn kaj sciencajn aparatojn de Philips. Oni ĵus instalas perkablan televidan sistemon de Philips.



fido al **PHILIPS** estas tutmonda

Okupante preskaŭ 250.000 kunlaborantojn, Philips estas unu el la plej grandaj elektronaj industrioj de la mondo. Propraj naciaj organizoj en 55 landoj, agentoj en 115 merkatoj.

LUMO, SONO, RADIO, TELEVIDO, MASTRUMAJ APARATOJ, GRAMOFONDISKOJ, TELEKOMUNIKADO, KEMIAJ KAJ FARMACIAJ PRODUKTAĴOJ, MEDICINAJ, INDUSTRIAJ KAJ SCIENCAJ APARATOJ KAJ ELEKTRONAJ KONSTRUPARTOJ.

